

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 12

Septembro 1937

Eldonanto :
Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth
(Herts.), Anglujo.

Redaktoro : Teo JUNG
223. Harstenhoekweg
Scheveningen
Nederlando.

en la jaro de sia ora jubileo montris, ke ĝi vivas kaj disvolviĝas, ke ĝi venkas ĉiam novajn barojn, ke ĝi konkeras ĉiam pli multajn kampojn kaj mediojn de la vivo por porti kulturen progreson al la homaro.

La Jubilea Kongreso

Estis feliĉa ideo okazigi la Jubilean Kongreson de Esperanto en Varsovio. La jaro 1937 fermas samtempe du limdatojn — 50 jarojn de Esperanto kaj 20 jarojn de post la morto de la Majstro. En tiu jaro estis do ĝuste — kaj tion sentis ĉiu esperantisto — fari pilgrimon al la tombo de la Majstro por esprimi dankemon pro la genia verko donacita al la homaro.

Sed samtempe, kiam Esperanto festis sian oran jubileon, sur ĝia ĉielo kolekt-

iĝis malfavoraj nuboj; la pionira kaj forta movado Esperanta en Germanujo devis interrompi sian laboron, ne povis partopreni la Kongreson niaj litovaj samideanoj, kaj la esperantistoj — tiuj, kiuj predikas pacon kaj harmonion — troviĝis ĝuste en tiu jaro en neunueco kaj neharmonio.

Sed spite al tiuj cirkonstancoj, spite al multaj mankoj kaj eraroj en la kongresa organizo, — ŝuldataj grandparte al la cirkonstancoj, — spite al ĉio, Esperanto

La eksterlandanoj komencas alvenadi.

Interkonatiĝa Vespero.

Jam kelkajn tagojn antaŭ la 7-a de aŭgusto komencis alvenadi Varsovion diverslandaj samideanoj: jen el malproksima Japanujo venis Prof. Yagi kaj s-ro Nakahara, venis el Anglujo s-ro Goldsmith kun sia filino, tuj okupiĝante pri organiza laboro, venis sur bicikloj la du nederlandaj fratinoj Tini kaj Lucie Weijer, trabiciklinte 3.145 km., venadis ĉiam pli kaj pli multaj samideanoj el ĉiuj mondflankoj.

En la akceptejo fariĝis ĉiam pli dense; iu serĉis iun, alia serĉis ion, unu demandis la alian, sonis demandoj diversaj: « kie? », « kiam? ». Ne ĉiam tiuj demandoj trovis respondon. Oni ne sciis, oni ne estis certaj.

Kelkaj pesimistoj eĉ skuis per la kapoj demandante: kiam fine oni scios, kiam fine oni estos certaj pri ejoj, aranĝoj ktp.

Troviĝis eĉ kalkulema matematikulo, nia ŝatata kaj fervora samideano Buenting el Nederlanda Hindujo, laŭ kies teoriaj kalkuloj « se tiel iros, oni devos havi 10 tagojn por enmanigi al ĉiuj kongresanoj iliajn... kongresdokumentojn ». Feliĉe, ke s-ano Buenting iom eraris. Aliaj ŝatataj samideanoj senapelacie verdiktis, ke la poloj ne scipovas organizi... Komprenoble, ankaŭ ili troviĝis, oni ne povas juĝi tuton laŭ eta ero.

Fulmorapide tamen kuris tiuj necertaj tagoj. La eksterlandaj gastoj frualvenintaj ekstraktis la Kongreson kiel sian, kiel aferon de ĉiuj, kaj anstataŭ plendi, anstataŭ nur rigardi, ili ekstaris libervole al malfacila laboro, kelkfoje dum 12 eĉ 16 horoj seninterrompe.

Tiel pasigis la antaŭkongresajn tagojn en Varsovio s-ro Goldsmith, f-ino Goldsmith, s-ro Buenting, fratinoj Weijer k.a.



LA SOLENA MALFERMO DE LA JUBILEA KONGRESO.

Ĉe la oratora pupitro: S-ro Direktoro Frelek.

(Foto: Pola Agentejo Telegrafa/PAT, Warszawa.)

Fine venis sabato, kaj ĉirkaŭ 600 kongresanoj kunvenis en kafejo-ĝardeno por konatiĝi kaj fari la unuan paŝon en la kongreso-semajnon.

La kafejo Bagatela montriĝis bone elektita loko por la *Interkonatiĝa Vespero*, des pli, ke estis varmega kaj bela vespero. Tiu vespero estis unu el la belaj kongreso-vesperoj. Super ni etendiĝis blua plenstela ĉielo, kvazaŭ admirante la centojn da diverslingvanoj, libere parolantaj unu belsonan lingvon, la unuan fojon tie aŭdatan. Sub la influo de tiu vespero eĉ la plendemuloj mildiĝis, forgesinte, ke diversaj neoportunaĵoj ilin ĝenis. Ĉio do kvazaŭ forgesiĝis, kaj kreiĝis unu granda familio, manĝanta, trinkanta, dancanta kaj amuziĝanta.

Dimanĉo.

Diservoj. - Solena Malfermo en ĉeesto de Vic-ministro de la Pola Registaro. - La esperantistaj reprezentantoj deziras unuecon kaj konkordon en nia movado. - La 14-a Kongreso de Blinduloj: alta distingo de s-ano Thilander. - Denove el Saŭlo fariĝis Paŭlo. - Prelego pri Zamenhof. - Jubilea Ekspozicio. - Festo de Veteranoj. - Kiel la pola gazetaro rilatis al la Kongreso.

Je la 9-a matene okazis esperantlingvaj *diservoj*, kaj, je la 11-a, kongresa delegacio metis florkronon en la palaco Belveder memore al la pola marŝalo Pilsudski.

Frue antaŭ la 12-a horo komencis pleniĝadi la salono de la Filharmonio, kie okazis la *Solena Malfermo* de la Kongreso. La salono estis ornamita per verdaj kaj diversŝtataj standardoj. Sur la podio staris busto de Zamenhof. Sur granda scenejo okupis lokon reprezentantoj de diversaj registaroj kaj naciaj societoj, kaj malantaŭ ili lokiĝis orkestro.

Je la 12.25, antaŭ proksimume 1.200 ĉeestantoj, la prezidanto de LKK, s-ro *Wyszynski*, faris salutparoladon dankante la polan registaron, reprezentitan de Vicministro D-ro *Piestrzynski*, pro la subteno al la Kongreso kaj dankante la ĉeestantojn, el kiuj multaj venis el malproksimaj landoj. Menciinte la valoron de Esperanto, s-ro *Wyszynski* memorigis, ke la signalvorto de la Kongreso estas « Esperanto en la lernejon », kaj pri tiu temo la Kongreso ĉefe okupiĝos.

Sekvis jubilea parolado de Prof. *Bujwid*; li deklaras, ke li laboras por la ideo de la Majstro, kiu sukcesis doni al la mondo perfektan interkomprenilon. Tiu ideo devas venki por enkonduki pacon kaj amon inter la naciojn. Je propono de Prof. *Bujwid* oni honoras la

memoron de la Majstro per ekstaro kaj unuminuta silento.

Per aklamado, oni elektis Prof. *Bujwid* kiel prezidanton de la Jubilea Kongreso.

Prof. *Bujwid* deklaras la Kongreson malfermita. La orkestro ludas la polan nacion himnon kaj la Esperon.

Prof. *Bujwid* invitas al la prezidantaro s-rojn: Paul Nylen, Gen. Bastien, Liniger, Prof. Yagi, Wyszynski, Hartman kaj Pruski.

Ekstaras *Julio Baghy*; ektondras aplaŭdegoj. *Baghy* alparolas la Kongreson per la « Himnaj rekordoj ».

Kortuŝa sento torente trafluas la ĉeestantaron. Dankaj aplaŭdoj longdaŭre tondras tra la salono.

Direktoro *Frelek* salutas la Kongreson en la nomo de la ĉefurba konsilantaro kaj de la urboprezidanto. Sekvas salutoj de oficialaj reprezentantoj de diverslandaj registaroj: Aŭstrio, Suda Aŭstralio, Belujo, Bulgario, Estonio, Finnlando, Liechtenstein, Nederlando, Norvegujo, kaj Papuo.

La reprezentantoj de la registaroj mencias la interesiĝon kaj subtenon, kiujn iliaj registaroj montras al Esperanto. Sekvas salutparoladoj de reprezentantoj de internaciaj kaj naciaj organizaĵoj. Kiel la unua, en la nomo de IEL parolis generalo Bastien.

Gen. *Bastien* tuŝis la unuecigan problemon, substrekante ke en la nunaj cirkonstancoj la Esperanta popolo neniel povas viviĝi du internaciajn organizaĵojn. Li esprimas sian koran deziron, ke la esperantistaro trovu solvon por la unueciga demando.

Fine oni laŭtleĝis kelkajn telegramojn inter kiuj longedaŭrajn aplaŭdojn rikoltis la ĉi-suba: La hispana popolo, batalante por sia libereco kaj sendependeco, ne forgesis pri la Jubilea en Varsovio. Subskribita: Generalidad de Catalunya.

Inter la salutparolantoj troviĝis usonano, papuano, japano — kaj eĉ negro el Nigero.

En ĉiuj paroladoj oni povis rimarki unu komunan trajton, unu fortan deziron, kiun tutplene subtenis la publiko: *Unuecon kaj konkordon en la Esperanto-movado!* Tiu frazo, eldirita preskaŭ de ĉiu parolinto, trovis unuaniman subtenon de la aŭskultantaro.

Per la grupa himno de *Baghy* « Nova sento », bone prezentita de la orkestro, finiĝis la solena malfermo de la Jubilea.

Tiu dimanĉa tago estis laciga pro la amaso da laboro. Ankoraŭ ne finiĝis unu aranĝo, kaj jam oni devis kuri en alian ejon por ĉeesti alian.

Je la 17a horo okazis la malfermo de

la *XIV-a Kongreso de la Blinduloj*. Tiu faka kongreso estis bone aranĝita de kapitano *Silhan*. La ŝtata Porblindula Instituto en Varsovio multtrime subtenis la kongreson kaj helpis ĝin sukcesigi. Ĉiuj aranĝoj de la Kongreso okazis en la Instituto.

La Kongreson partoprenis pli ol 100 blinduloj el 14 landoj. Je la fiksita horo, en ĉeesto de reprezentanto de la pola registaro, de la franca ambasadoro, de kelkaj porblindulaj organizaĵoj kaj de ĉirkaŭ 300-persona publiko, kapitano *Silhan* malfermis la Kongreson. Kiel honora prezidanto estis elektita sejmdeputito, majoro *Wagner*, prezidanto de la militblindula organizaĵo en Polujo, kaj kiel efektivan prezidanton oni elektis kapitanon *Silhan*.

Majoro *Wagner* faris paroladon, menciante, ke la blinduloj povas plibonigi sian mizeran staton nur per forta organizacio.

Sekvis diversaj salutparoladoj, dum kiuj okazis malagrable incidento: en la nomo de iu blindula organizaĵo Varsovia prenis salutvorton pensiita kolonelo *Klobukowski*, kiu parolis kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ ĝia uzado inter la blinduloj. Fariĝis tumulto; la aŭskultantaro protestis, kaj oni ne lasis lin fini.

Kvazaŭ por mildigi tiun impreson kaj montri, ke tiu sinjoro ne prezentas ĝeneralan opinion, majoro *Wagner* komunikis, ke la pola ŝtatprezidanto, konsiderinte la penan kaj fruktodonan laboron de nia sveda samideano-blindulo, *Harald Thilander*, decidis distingi lin per la alta pola ordeno « Polonia Restituta ».

Post fermo de la kunsido la ĉeestintoj vizitis la tre interesan ekspozicion de diversaj interkompreniloj kaj aliaj objektoj uzataj de la blinduloj.


(Interesa kaj vere notinda fakto: Jen, la supre nomita kolonelo *Klobukowski*, kiu ĉe la malferma kunsido montris malŝaton por Esperanto, fariĝis amiko de nia movado! Dum la Kongreso li interesiĝis pri ĉiuj laboroj kaj li konvinkiĝis, ke ili estis fareblaj nur dank' al Esperanto, kiu kapablas solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj. H.G.)

Je la 18-a horo, en la Kongresejo, s-ro *Glück* faris prelegon s.t. « Zamenhof kiel scienculo kaj filozofo ». La prelego de s-ano *Glück*, prezentanta la problemon profunde kaj ĉiufanke, vekis merititan atenton de la multnombraj ĉeestantoj.

Je la 19-a horo, en alia ejo, estis malfermita la *Jubilea Ekspozicio*.

Bedaŭrinde, tiu ekspozicio ne estis

L'espero, l'obstino kaj la pacienco!



LA BELEGE ORNAMITA TOMBO DE LA MAJSTRO.



BLINDA PASTRO V. D. BOSCH CELEBRAS ESP.-DISERVON.

(Fotoj: Pola Agentejo Telegrafa/PAT, Warszawa.)

kompleta nek kontentiga. Esperanto, post 50-jara ekzisto, kapablas kaj devas montri pli riĉan demonstracion. Specialan atenton tamen meritas la ĉambro dediĉita por la Majstro. En ĝi ni vidis ĉiujn objektojn, inter kiuj ekestiĝis Esperanto. Ni povis ankaŭ konvinkiĝi, ke D-ro Zamenhof aplikis Esperanton en sia privata vivo, uzante la lingvon eĉ por plej intimaj aferoj familiaj, aranĝitaj letere.

Je la 20,15 okazis la speciala nunjara aranĝo, la «*Festo de Veteranoj*». La laŭdojn pro la impreso de tiu aranĝo, meritas nia senlaca Baghy, kiu ĉie kaj ĉiam montriĝas taŭga. La «*Festo de Veteranoj*» konsistis en tio, ke oni distingiĝis per oraj kaj arĝentaj steloj preskaŭ 200 malnovajn esperantistojn. Tiuj, kiuj esperantistiĝis antaŭ la Bulonja Kongreso, ricevis orajn stelojn, kaj tiuj, kiuj esperantistiĝis antaŭ la Krakova en 1912, estis distingataj per arĝentaj steloj.

En ĉeesto de kelkcent kongresanoj komenciĝis la festo. Orkestro ekludis funebro-marŝon, kaj samtempe Julio Baghy recitis nomaron de mortintaj Esperanto-pioniroj. Sekvis disdono de diplomoj al la ĉeestantaj veteranoj. Tiu aranĝo fermis la unuan, tiom laboroplanan kongrestagon.

La pola gazetaro ekinteresiĝis pri la Kongreso. Dimanĉe kaj lunde (same dum la tuta Kongreso), aperis artikoloj en multegaj polaj gazetoj. La plejmulto estis favoraj, troviĝis tamen kelkaj gazetoj, kiuj malfavore rilatiĝis al la Kongreso. Tiuj atakoj cetere komenciĝis kelkajn semajnojn antaŭ la Kongreso, kaj ili estis ĉefe direktitaj kontraŭ organizaj metodoj kaj unuopaj personoj de LKK.

Fine ankaŭ tiuj gazetoj ŝanĝis la tonon. Tio okazis dank' al influo de la *Pola Agentejo Telegrafa (P.A.T.)* re-

prezentita dum ĉiuj aranĝoj de la Kongreso de s-ro red. *Antoni Pisarski-Woydakowski*.

Dum la dimanĉa tago PAT eldonis pri la Kongreso tri komunikojn gazetarajn, unu porradian, kaj kelkdekon da kongreso-fotoj en sia ilustrita servo.

Dum ĉiuj aranĝoj de la Kongreso ĉeestis speciala foto-raportisto de PAT. Por la eksterlanda servo — atinganta preskaŭ tutan mondon — estas donitaj kelkaj franclingvaj komunikoj kaj pli ol 200 fotoj. Por la pola provinca gazetaro estas donitaj pli ol 400 fotoj.

Jen la kaŭzo, ke la malfavora gazetaro ŝanĝis sian tonon.

Lundo.

Pilgrimo al la tomboj de la Majstro kaj de Grabowski. - Unua laborokunsido de IEL. - Teatra Vespero.

Tiu tago certe restos por ĉiam en la memoro de multaj esperantistoj. Tiu tago ĉefe estis dediĉita por la *memoro de la Majstro kaj Antoni Grabowski*. Ĝi estis la tago, kiam la fidelaĵ disĉiploj el ĉiuj mondflankoj pilgrimis al la tomboj de D-ro Zamenhof kaj Grabowski. — Je la 9-a horo matene, Prof. Bujwid, en la nomo de la Kongreso, metis florkronon sur la tombon de la nekonata soldato. Kelkajn minutojn poste kapitano Silhan metis tie florkronon en la nomo de la Blindula Kongreso.

Sekvis komuna forveturo al la *hebrea tombejo*, kie ripozas la *Majstro*.

La kongresanoj kolektiĝis en naciaj grupoj. Per mikrofono ekparolis Prof. *Bujwid*, memorigante la vivon, laboron kaj morton de la Majstro. Sekvis kortuŝa parolado de gen. Bastien. En muta silento ĉiuj aŭskultis pri la vivo de Zamenhof. Li havis unu solan celon en sia vivo — semi pacon kaj amon tie kie re-

gis malpaco kaj malamo, feliĉigi kaj helpi malriĉulojn kaj mizerulojn. Noblaj ideoj kaj agoj. Dume eksplodis milito: li predikis amon, sed eksplodis buĉado. Lia nobla koro tion ne eltenis, sed liaj ideoj vivas inter ni.

En la nomo de la hebrea komunumo en Varsovio parolis ĝia prezidanto, s-ro *Mayzel*, kaj rabeno *Posner* parolis en la nomo de la Varsovia rabenaro.

Florigan paroladon faris s-ino *Thilander*, la edzino de Harald Thilander. Ŝi esprimis dankemon por Esperanto kaj ĝia ideo, kiuj tiom multe servas al la blinduloj kaj faciligas ilian malfeliĉan kaj malluman vivon.

Apud la tombo de la Majstro okupis lokon la Familio.

En la nomo de la Kongreso oni metis florkronon. Alian florkronon, en la nomo de la Hungara Esperanto-Federacio, metis Baghy kaj Kalocsay. Sekvis defilado de naciaj grupoj. Ĉiu preteriranto ĉe la tombo klinis la kapon kaj metis floron aŭ floraron. Kreskis la amaso da diantoj kaj lilioj. Kelkiu el la trapaŝanto haltis por momento, volis ekparoli; sed, anstataŭ vortoj, larmoj ekfluis el liaj okuloj...

Proksime de la hebrea situas la *katolika tombejo*. Tie ripozas *Antoni Grabowski*, la plej intima kunlaborinto de la Majstro kaj la plej fervora disvastiginto de Esperanto. Tien nun ekiris la kongresano.

Parolis Prof. *Bujwid* kaj s-ano *Glück*.

La parolado de s-ano Glück estis la plena esprimo de la korsentoj, kiujn nun travivis la multlandaj disĉiploj, pilgrim-alvenintaj al la tomboj de la Majstro kaj Grabowski. Estis neeble reteni la larmojn en la okuloj, kiam la blankbarbula Prof. Bujwid kisis la parolinton pro lia tiom profunda kaj tiom sento-kaj esprimoplena parolado.

laboris kaj partoprenis diversajn aranĝojn. Sed posttagmeze oni sentis ian specialan bonan humoron: estis ja kelkajn horojn antaŭ la *Internacia Balo*, tiu kongresa aranĝo, kiu famiĝis ne nur en la esperantistaj rondoj, sed ĝi eĉ vekis intereson inter la vasta publiko. Ĉar vere: nur la internaciaj baloj de la esperantistoj povas fieri pri tiom granda internacieco kaj samtempe tiom proksima intimeco kaj amikeco.

Je la 22-a horo estis jam kolektiĝintaj preskaŭ ĉiuj partoprenintoj en la balo. Jen ni vidis ĉarmajn svedinojn en diversregionaj kostumoj naciaj, jen estis nederlandaninoj, hungarinoj, estoninoj, finnlandaninoj, kaj ĉiaj aliaj — sed ĉefan atenton tiris ĉarma, nacivestita japanino, akompanata de nia ŝatata samideano Prof. Yagi, vestita en silka nigra kostumo de samurajo. Li ricevis, cetere, la unuan premion pro la plej bela kostumo.

Sabato.

Ferma Kunsido. Oni aŭdas pri senrezultaj traktadoj de IEL kaj UEA: Ĝenevo restas nekomprenema. Tamen « provizora paco » estas proklamata. Jam oni sopiras iri Londonon! Kaj 1940 eble en Tokio? Ni estas esperantistoj kaj ni restu esperantoj!

Nervostreĉa tago estis ĝi. Por la 10-a horo estis decidita la *Ferma Kunsido* de la Jubilea.

La ne sole amuziĝantaj esperantistoj dum la tuta kongreso-semajno ja povis senti ian specialan atmosferon, ian pezan nubon, kiu kaŝadis la apenaŭ videblan, sed tiom forte deziratan unuecon kaj harmonion en la Esperanta movado. Ja jam ĉe la malferma kunsido gen. Bastien akcentis, ke la sola deziro de IEL estas unuecigi la Esperanto-movadon, ĉar la fortoj de la esperantistoj povas apenaŭ vivi unu organizon kaj neniel povos en la nunaj cirkonstancoj vivi du tiaj. Dum la tuta semajno la komitato de IEL konstante laboris.

Okazis tri laborkunsidoj de IEL en ĉeesto de la komitato. Dum tiuj kunsidoj la komitato nin informis pri la traktadoj inter IEL kaj UEA. En tiuj traktadoj, okazintaj en la laborĉambro de la Majstro, kaj sub la prezido de lia filo, D-ro Adam Zamenhof, partoprenis po tri reprezentantoj de IEL kaj UEA. Estis faritaj multaj proponoj kaj sugestoj, la komitato de IEL estis cedema ĝis maksimumo, kaj por la bono de la Esperanta movado gen. Bastien kaj s-ro Malmgren estis pretaj ekŝigi el la komitato, sed la reprezentantoj de UEA montriĝis tiom obstinaj kaj ne komprenantaj la nunajn cirkonstancojn, ke estis neeble solvi tiun problemon. Oni apenaŭ povis atingi tiel nomatan « pro-

vizoran pacon », dirantan, ke ambaŭ flankoj ĉesigos ĉiujn reciprokajn kontraŭbatalojn kaj atakojn. (La kompleta materialo pri la traktadoj inter IEL kaj UEA estas publikigota.)

Tamen, malgraŭ ĉi tio, oni sentis, ke io okazos dum tiu ferma kunsido.

La sufiĉe granda salono de la kongresejo rapide pleniĝis. Ĉiuj sidlokoj estis okupitaj, baldaŭ ekmankis ankaŭ starlokoj.

Je la 10.30 Prof. *Bujwid* malfermis la kunsidon.

La sekretario informis, ke dum la Kongreso venis telegramoj kaj leteroj de kelkaj registaroj, de Parlamento-prezidanto de Francujo Herriot, de Dresdenaj kaj Berlinaj esperantistoj, kaj aliaj.

D-ro *Adam Zamenhof* prenis parolon por raporti pri la rezultoj de la unueciga laboro inter IEL kaj UEA.

Poste prenis voĉon s-ro *Jakob*, kiu en akra formo komencis diskuton kun IEL.

Sekve la prezidanto, Prof. *Bujwid*, petis la kongresan sekretariojn, s-ron *Hartman*, ke li klarigu ke antaŭ unu semajno dum la kunsido de Internacia Porkongresa Komitato, kiun ĉeestis ankaŭ s-ro *Jakob*, oni akceptis decidon, ne diskuti dum la ferma kunsido de la Kongreso, nur prezenti raportojn kaj rezoluciojn. Sed s-ro *Jakob* ne observis tiun decidon.

Poste parolis gen. *Bastien*, kiu raportis pri la laborkunsidoj de IEL.

Kapitano *Silhan* en sia raporto pri la *blindula kongreso*, komunikis ke angla Lordo *Nuffield* juŝ donacis al la anglaj blinduloj 35.000 pundojn.

S-ro *Klimecki* kaj D-ro *Czubinski* prezentis raporton pri la *pedagogia kunveno*. Kiel bazo por ĝiaj diskutoj kaj rezolucioj estis prenitaj la tiurilataj decidoj de la Pariza konferenco nunjara.

S-ino *Cense* raportis pri la *katolika kunveno*. Ŝi prezentis kelkajn rezoluciojn, inter kiuj estis deziresprimado de la katolika kunveno, ke la Kongreso protestu kontraŭ la ĵurnalistoj, kiuj informis siajn legantojn neĝuste, aliformigis faktojn kaj kaŭzis malfavoron por Esperanto.

Raporton pri la laborkunsido de la *Lingva Komitato* faris ĝia prezidanto, inĝ. *Isbrücker*. La Lingva Komitato de-

cidis prilabori radikan terminaron kun Esperantaj klarigoj, helpe de ĉiuj esperantistoj. La diversaj klarigoj kaj projektoj estas publikigitaj en la Esperantaj gazetoj, kaj ĉiu esperantisto povos esprimi sian opinion.

Fine oni decidis sendi danktelegramojn al la pola ŝtatprezidanto, Prof. *Moscicki*, kaj al la ĉefministro *Slawoj-Skladkowski*.

Prof. *Bujwid* dankis al la kongresa sekretario, al la LKK kaj al la kunlaborintoj ĉe la Kongreso, menciante ankaŭ la nomojn de la eksterlandanoj, kiuj oferis por tiu celo tiom multan tempon.

Kiel lasta parolis s-ro *Paul Nylén*. Li substrekis la idean signifon de la Esperantaj kongresoj, kiuj por unu semajno kreas la landon de la esperantistoj, Esperantuĝon.

Prof. *Bujwid* deklaris la Kongreson fermita, kaj la ĉeestantoj ekkantis la « Esperon ».

Je la sesa horo kelkdeko da kongresanoj partoprenis duhoran promenon per ŝipo sur la *Vistulo*, kaj vespere oni denove renkontiĝis en *Bagatela* por diri adiaŭ.

Parto de la kongresanoj forlasis *Varsovion* sabate matene, aliaj vespere, kelkiuj restis por dimanĉo aŭ eĉ lundo. Ili disiris en la tutan mondon: Amerikon, Afrikon, Azion...

Unuj iris rekte hejmen, serĉante la plej malmultekostan kaj mallongan vojon, aliaj aliĝis al ekskursoj, kaj ili vagas tra *Polujo* kaj aliaj landoj, kaj ili atingos sian hejmojn nur post multaj semajnoj...

Jam pli ol 100 kongresanoj aliĝis al la XXX-a en *Londono*, kaj kun sopiro ili rakontis kiel bone kaj interese estos tie.

Tiuj sopiraj rakontoj influis la kongresanojn, kaj unu la alian salutadiaŭis per signalvorto:

Ĝis revido, ĝis revido en Londono...
Henryk Gielb.

P.S. - Niaj japanaj samideanoj forte propagandis la ideon, okazigi la *Universalan Kongreson de Esperanto en 1940 en Tokio*. Ili plene sukcesis en sia propagando. La Esperanta popolo prenis tion kiel jam deciditan fakton, kaj kun entuziasmo oni parolis pri la ĉarmaj tagoj, kiujn oni pasigos en la ĉerizo-flora kaj sunleviĝa lando...

Kaj nun : LONDONO !

Petu aliĝilojn de la LKK, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ de la Redakcio de « Esperanto Internacia », Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. — Aldonu respond-kuponon!

Je la 16-a horo samtage, sub la prezido de gen. *Bastien*, okazis la unua laborĉunsido de IEL. La kunsidon partoprenis pli ol 200 personoj. Ĉar intertempe okazis traktadoj kun la estraro de UEA, oni ne povis ion ajn novan decidi. (Pri la laborĉunsidoj de IEL kaj iliaj rezultoj, mi raportos ĉe la fino. H.G.)

Tiu laborĉunsido estis do dediĉita al la problemoj de laŭplana kaj racia propagando de Esperanto. Elĉerpan kaj bonegan referaton prezentis s-ro *Malmgren*.

Kun vera intereso ni eksciis pri la propagando-metodoj de la svedoj, kaj pri la rezultoj, kiujn ili atingis.

La referato de s-ro *Malmgren*, kiu enhavas multajn bone pripensitajn kaj por multaj landoj taŭgajn propagando-metodojn, nepre devas esti publikigota en la oficialaj organoj de la Esperanta movado.

La lunda vespero estis dediĉita por teatro. La Varsovia opero je la unua fojo vidis tian publikon. Ĉiuj lokoj estis okupitaj.

Kiel la unua parto de la programo estis komedio de Fredry « *Consilium facultatis* », tradukita de *Grabowski*.

Ĉi-okaze mi volas diri kelkajn vortojn por eventuale influi venontajn, tiaspecajn aranĝojn. La LKK-oj neniam forgesu, ke la esperantistoj estas homoj vizitantaj teatrojn en siaj landoj, multfoje teatrojn unuarangajn, kaj tial ili scipovas taksu teatraĵojn, kaj ili estas ankaŭ postulemaj.

La programo konsistis krome el du aliaj partoj. Specialan atenton meritas la hungara valso (esperantigita de *Baghy*), kantita de virina kvarteto, kaj la tria parto, « *Edziĝo-festo en Olkusz* », baleto kun ĉarmaj polaj dancoj regionaj.

Mardo.

Fakaj kunsidoj. - Dua laborĉunsido de IEL. - Altnivela Literatura Vespero.

Tiun tagon okazis diversaj fakaj kunsidoj (TAGE, TEKA, Katolikoj, Bahanoj) kaj prelegoj, pri kiuj kredeble raportos iu el la ĉeestintoj.

Je la 16-a horo okazis la dua laborĉunsido de IEL. Dum ĝi ni eksciis, ke okazos ĉomuna kunsido de tri reprezentantoj de IEL kaj UEA sub prezido de D-ro *Adam Zamenhof*.

Poste s-ro *Goldsmith* raportis pri la agado de IEL, kiu montris tre kontentigan disvolviĝon.

Je la 20-a horo, en ĉeesto de pli ol 300 personoj, okazis la « *Literatura Vespero* » aranĝita de « *Literatura Mondo* ». Tiu vespero denove montris, ke niaj hungaraj samideanoj estas bonegaj organizantoj. Kompreneble, la ĉefan rolon ludis ne iu alia, nur *Baghy* kaj *Kalocsay*. Ili verdire plenumis 90 procentojn de la programo. *Kalocsay*, sen kiu mi ne imagas la Esperantan poezion,

montriĝis ne malpli bona artisto ol poeto.

Baghy kaj *Kalocsay* alterne, per rakontoj, deklamoj kaj ŝercaĵoj tenis la aŭskultantaron dum du kaj duona horoj, rikoltante plene meritajn dankojn kaj aplaŭdojn. Multe ankaŭ helpis al la sukceso de la vespero alia « *Literatura Mond-ano* », *Ludoviko Totsche*, per impresoplena deklamado de siaj verkoj. Malgraŭ kelkaj malfavoraj cirkonstancoj (manko de konvena scenejo, malbona akustiko k.s.), la literaturema publiko estis plene kontenta pri tiu interesa kaj altnivela aranĝo.

Merredo.

Pilgrimo al Bjalistok.

Tiu tago estis nomita ekskursata tago; inter aliaj, okazis pilgrimo al Bjalistok, al la naskiĝurbo de la Majstro. Pri Bjalistok estos eventuale aparta raporto de partopreninto en la ekskurso.

Ĵaŭdo.

Post 14 diversaj kunsidoj kaj prelegoj sekvas Gaja Vespero.

La paĝo en la kongresa libro, rezervita por ĵaŭdo, montris, ke la programo de tiu tago konsistas el 14 diversaj fakaj kunsidoj kaj prelegoj.

Pro ĵurnalista devo mi decidis viziti kiel eble plej grandan parton de tiu programo. Sed — mia deziro ne povis trovi kontenton; jen, kelkaj el tiutagaj aranĝoj tute ne okazis, aliaj eble okazis, nur Dio sciis kie. Malgraŭ ke la kongresejo ne estis tro ampleksa, estis malfacile en ĝi trovi ion. Mankis inform-organizo.

Kelkfoje okazis, ke unu informis vin tiel, kaj jen venis alia, kiu « ĝustigis » la antaŭan. Fine vi multfoje devis rezigni, neniel sukcesinte trovi la deziritajn.

Simile okazis kun la tiutaga prelego de s-ro *Glück* pri *Grabowski*. S-ro *Glück*, post sia unua prelego kaj parolado ĉe la tombejo, fariĝis fama inter la kongresanoj, kaj la anoncita de li prelego vekis grandan intereson.

Ĵaŭdon matene oni anoncis ĝin en la granda salono. Poste oni informis, ke ĝi okazos en « alia » salono; fine, kelkajn minutojn antaŭ la komenco, oni eksciis, ke ĝi okazos en teretaĝo; kaj samtempe sur la muro pendis karteto, ke ĝi okazos en la granda salono... La rezulto estis tia: dum longa tempo la interesitoj pri la prelego serĉis ĝin, kaj ĉiufoje iu alia, trovinte la ejon, malhelpis la prelegon per sia enveno...

La precizeco fariĝis eĉ proverba. Kiam oni diris al iu: « post 10 minutoj », tiu tuj demandis: « sed kiaj minutoj, polaj aŭ internaciaj »...

La prelego pri *Grabowski* altiris ĉirkaŭ 150 aŭskultantojn. La preleginto montris kian rolon okupas *Grabowski* ne nur en la Esperanta literaturo, sed

ankaŭ en la historio de la ekestiĝo de Esperanto. Ĝi estis profunda kaj elĉerpa referato, prezentita en formo tre populara, tiel, ke eĉ mezbona esperantisto povis ĝin plene kompreni.


Por la 20-a horo estis anoncita « *Gaja Vespero* ». Iom antaŭ la 20-a komenciĝis demonstracio de la filmo « *Antaŭen* », pri kiu la legantoj de « *Heroldo* » kaj « *Esperanto Internacia* » jam havis okazon legi. Poste oni transiris al la « *Gaja Vespero* ». Kelkaj punktoj de la programo estis tre kontentigaj, precipe tiuj de *Baghy* kaj *Kalocsay*. (Ho, sankta Dio, se ili ne estus en Varsovio!). La plej multaj numeroj tamen estis tro improvizitaj.

Je la 16-a horo de tiu tago okazis kunveno de juristoj, en kiu partoprenis kelkaj personoj. Kiel prezidanton oni elektis D-ron *Jean Couteaux* el Parizo kaj kiel sekretario estis elektita D-ro *Dreher* el Krakov.

Vendredo.

Denove kunsidoj, referatoj, prelegoj, kaj: Internacia Balo. Japana Profesoro Yagi ricevis la ĉefpremion pro sia belanacia kostumo.

Ankaŭ vendredo estis labora tago: kunsidoj, referatoj kaj prelegoj. Bone sukcesis la kunveno de TAGE kaj tiu de la skoltoj. Malgraŭ laceco, la homoj



JAPANA SAMIDEANO S. NAKAHARA en akompano de Henriko Giel rigardas la Zamenhofan straton en Varsovio.
ĈE LA INTERNACIA BALO. — De maldekstre dekstren: F-ino Lidja Zamenhof, f-ino Syikumi, Prof. Yagi, s-ro Nakahara, f-ino Zofja Zamenhof.



RIGARDO SUR REĜAN KASTELON « HRAĜANI » EN PRAHA.

La Antaŭkongreso en Praha

kiu okazis la 5-an kaj 6-an de aŭgusto 1937, venigis en la ĉeĥoslovakon ĉefurbon multajn gesamideanojn. La unuaj alveturis jam unu semajnon antaŭ la kongreso. Kaj ju pli proksimiĝadis la 5-a de aŭgusto, des pli multaj fremduloj aperadis en la nova oficejo de EAĈSR kaj en la loĝejoj de la klubaj funkciuloj.

La prepara komitato, kiu konsistis krom unu el la membroj de la Asocio kaj Klubo, havis neniajn postulojn de la kongresanoj. Male. Klare ĝi diris ke ne ekzistas kotizo! Sed kio ekzistis en sufiĉa kvanto, estis diversaj plifaciligoj, rabatoj, ofte eĉ mirinde altaj, donacetoj, kaj la ebleco pasigi agrablajn tagojn en Ora, Centtura Praha, en la rondo de servemaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Nur unu peton havis la aranĝantoj! Ĝustatempan aliĝon kaj sciigon pri horo de alveturo, por ke lokaj esperantistoj povu renkonti siajn gastojn en la stacidomo.

La 5-an de aŭgusto je la 20-a horo okazis la kunveno interkonatiĝa, kun iom da programo. Ĝi okazis en luksa kafejo « Louvre », kie Esperantista Klubo en Praha havas sian kunvenejon. Oni nur disponigis por la antaŭkongreso kaj ĝiaj kunvenoj iom pli grandan salondon, ĉar la kluban kunvenejon ne povus eniri pli ol 100 personoj. Sed mi ne estus ĝusta, se mi ne dirus, ke la unuaj kunvenemuloj venis jam du horojn antaŭ anoncita komenco. La muziko sub la gvidado de samideano muzikestro Khel agrable ludis dum la tuta vespero. Dume la kunveninta gesamideanaro parolis kaj babilis, rakontis kaj amuziĝis tre amike. De buŝo al buŝo, de koro al koro, ĉu laŭte aŭ flustre flugis la vortoj de unu al la alia. Manoj centfoje premiĝis. Malnova amikeco estis nove konfirmata, nova amikeco estis ligata. Estis kiel dum malgranda kongreso. Impresis komuna kantado de la himnoj esperanta kaj ĉe-

ĥoslovaka. La vesperon beligis prezento de tri filmoj disponigitaj al la aranĝantoj de la ministerio por komerco. La unuaj du filmoj montris belaĵojn de Praha dum printempa florado, kaj slovakajn banlokojn. La tria filmo havis tie sian premieron. Ĝi estis kolora, kaj montris fabelan riĉecon de ĉeĥoslovakaj naciaj kostumoj. — Ĉar la kunvenon ĉeestis reprezentantoj de 15 nacioj, okazis ankaŭ prezento de unuopaj grupoj. El tio denove rezultis multaj agrablaj surprizoj, kiel ekz. renkontiĝo de malnovaj korespondantoj ktp. En agrabla amuzo sidis la ĉeestantaro ĝis noktomezo.

Sekvintan tagon, la 6-an de aŭgusto, post la oka matene kolektiĝis en la sama salono la unuaj kongresanoj. Estas necese akcenti la eksterordinare agrablan medion, kiun kreis la lukse meblita ĉambrego kiun la klubo ornamis per plaĉa dekoracio kaj floroj. De sur la lustroj el fama ĉeĥa vitro pendis flagoj de ĉiuj reprezentitaj nacioj. Sed ora najlo inter ĉiuj ornamaĵoj estis granda busto de Zamenhof. Ĝi estas certe la plej perfekta el ĉiuj bustoj kiuj en la mondo ekzistas pri li. Mortinta edzino de nia majstro dum la XIII-a Universala Kongreso en Praha mem asertis tion.

Post la 9-a horo, en la nomo de l' prepara komitato malfermis D-ro A. Pitlík la festkunvenon per mallonga parolado kaj saluto. Poste salutis la antaŭkongreson vicprezidanto de EAĈSR s-ro O. Ginz, kaj prezidanto de la Klubo s-ro J. Šustr. Sekvis paroloj kaj salutoj de reprezentantoj de Esp. kluboj el diversaj partoj de Ĉeĥoslovakio, kiuj sendis siajn reprezentantojn.

La festparoladon pri la temo « 50 jaroj de Esperanto » faris sinjoro Glück, veninta el Nederlando. Li montriĝis bonega oratoro. Lia elokventa parolo ofte estis interrompata per aplaŭdoj de konsento!

Ne malpli kore estis akceptitaj liaj rememoroj pri la Majstro mem, kaj pri la interparoloj kun li. Per la lotumado oni poste trovis inter la eksterlandaj gastoj la feliĉulon, al kiu la komitato donacis ekzempleron de Ĉeĥoslovaka Antologio por daŭra memoro pri la Antaŭkongreso en Praha. La donacon ricevis samideanino J. Charlet, instruistino el Sain Bel (Rhône), Francujo.

Poste sekvis komuna tagmanĝo, post kiu okazis 4 horojn daŭranta rondvojaĝo tra Praha, kun la vizito al multaj ĝiaj vidindaĵoj. Du plenaj aŭtoĉaroj vizitis antaŭe la antikvan urbodomon de Praha, por meti en la nomo de internacia esperantistaro florkronon al la Tombo de Nekonata Soldato, kiu tomba troviĝas en urbodoma kapelo. La kongresanaron varme akceptis vicurbestro P. Tiliček, kiu ankaŭ akcentis la signifon de Esperanto kaj de ĝia movado, kaj la simpatiojn kiujn por ĝi havas la urbestro de Praha, kiu ĵus antaŭ nelonge decidis eldoni novan prospekton en Esperanto. En la nomo de ĉiuj reprezentitaj 15 nacioj dankis s-ro Pragano el Rumanujo.

La rondvojaĝo finiĝis post la 18-a horo. Sed ne finiĝis la kunvenado. Je la 20-a horo okazis ankoraŭ normala kunveno de Esperantista Klubo, al kiu estis ĉiuj gastoj invititaj. Prahanoj havis impreson, ke ilia kunveno plaĉas al la kongresanoj, ĉar multaj el ili tuj post finiĝo de la rondvojaĝo tien iris kaj ĝisatendis la kunvenon. Vidante la sinceran harmonion en la kunveno regantan, limigis la prezidanto de la Klubo s-ro Šustr preparitan programon je solaj dankoj kaj salutoj, volante doni al ĉiuj sufiĉe da tempo por plene eluzi la nemultajn horojn kaj minutojn kiuj estis ankoraŭ restantaj antaŭ forveturo al Varsovio. Kaj vere: ĉiuj estis plene okupitaj. Senpartia rigardanto havis impreson, ke ĉi tie ĉiu volas paroli kun ĉiu, kaj volas ne perdi eĉ sekundon de la tempo kiu neniam plu revenos.

En longa vico akompanis Esperantista Klubo siajn gastojn al la stacidomo de Wilson, por lastfoje ankoraŭ adiaŭi ilin, por lastfoje premi la manon de siaj gemikoj, por lastfoje per manpremo konfirmi reciprokamikecon, kaj deziri multan feliĉon al ĉio kio okazos en Warszawa. Sed jam ekmoviĝas la vagonaro. Aŭdiĝas kantado de la « Espero », kiu baldaŭ malaperas en tondra « Adiaŭ » kaj « Ĝis la revido »! Estis fino de belega fabeleto kiun oni travivis en centtura Praha.

La antaŭkongreson ĉeestis entute ĉirkaŭ 200 personoj el sekvantaj landoj: Aŭstrio, Estonujo, Francujo, Italujo, Jugoslavio, Litovujo, Nederlando, Polujo, Rumanujo, Svedujo, Svislando kaj Ĉeĥoslovakio.

Str.

La "neneŭtraluloj" Kongresoj de IKUE kaj SAT

En la semajno antaŭ la Jubilea Kongreso en Varsovio okazis en Nederlando du aliaj internaciaj Esperanto-kongresoj: tiu de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista en Hago, kaj tiu de Sennacieca Asocio Tutmonda en Roterdamo. Ambaŭ kongresoj, laŭ tio kion ni aŭdis kaj legis, kaj parte ankaŭ mem observis, tre bone sukcesis.

La 17-an SAT-kongreson partoprenis ĉ. 800 gekamaradoj; sed la Interfratigĉan Vesperon en « Doelenzaal » ĉeestis rondcifere 1200 personoj! Por malklare noktigi la kongresanojn, oni aranĝis komunajn nokteĵojn, por kiu la urbo senpage disponigis grandan ekspozician halon. La komunumo prezentis al la kongresanoj koran akcepton. En « Burgerzaal » (Civitana Salono) salutis ilin la urbestro, menciante interalie ke foje, en Svedujo, li persone observis scenon, kiam Esperanto faris tre utilan servon al franca vojaĝanto. — La 18-a SAT-kongreso okazos venontan jaron en Bruselo.

Iom malpli multnombre vizitita estis la 19-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj; sed ĝi okazis eble en pli grava kadro. Antaŭiris ĝin bone sukcesinta prezentado de klasika teatraĵo biblija « Josef en Dotan », de la fama nederlanda verkisto Vondel. La Malferma Kunveno kaj la ceteraj kongreskunsidoj havis lokon en fama « Ridderzaal » (Kavalira Salono), kie antaŭ 17 jaroj okazis la 12-a Universala Kongreso de Esperanto, kiel unua postmilita! Ĉeestis la malferman kaj ankaŭ aliajn kunvenojn de la IKUE-kongreso eminentaj personoj de la nederlanda katolika vivo. La urbestro de Hago, s-ro de Monchy — li mem iam lerninta nian lingvon — salutis la kongresanojn per esperantlingva parolado kaj gastigis ilin en la moderna konstruaĵo de la Urba Muzeo. Okazis diversaj ekskursoj: al Roterdamo, al la Jamboreo kaj al la strando de Scheveningen (apartenanta al la komunumo Hago), kie oni admiris grandan pireteknikaĵon. La katolika radio-societo disaŭdigis parton de la Malferma Kunveno. Jurnalulo « De Residentiebode » ĉiutage enhavis detalajn raportojn pri la kongreso kaj raportis esperantlingve ankaŭ pri diversaj gravaj okazaĵoj tra la mondo. — La sekvonta IKUE-kongreso okazos verŝajne en Bled (Jugoslavio).

Ambaŭ kongresoj do havis tre bonan sukceson, kaj ili certe kontribuis ankaŭ al la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto, t. e. la intereso, kiun ili vekis, sendube

utilos ankaŭ al la « neŭtrala » Esperanto-movado.

Bedaŭrinde la « neneŭtraluloj » (katolikoj kaj laboristoj) daŭrigas miskompreni la sencon de la « neŭtraleco », kvankam ili mem en iu senco estas neŭtralaj, eĉ (la laboristoj) foje deklaras sin tiaj. Ni opinias la flankbatojn de la « neneŭtraluloj » kontraŭ la « neŭtrala » Esperanto-movado tute superfluj kaj senutilaj. Esti « neŭtrala », laŭ li, ŝajne havas la sencon de esti « nenio ». Stranga opinio! De kie ĝi devenas?

En kio do konsistas la « neŭtraleco » de la « neŭtraluloj »? Simple en tio ke ili, batalante por Esperanto, opinias necese, en tiun batalon (por Esperanto) entiri la batalon pri politiko kaj religio. Tio ne malhelpas ke, ekster la batalo por Esperanto, tiuj « neŭtraluloj » povas esti eĉ tre pozitivaj katolikoj, aŭ tre ardaĵ defendantoj de iu politika tendenco.

Ankaŭ IKUE sendube estas « neŭtrala », ekzemple, en tio ke ĝi permesas al siaj membroj stenografi laŭ Gabelsberger, aŭ laŭ Gregg, aŭ laŭ Duployé, Intersteno, aŭ kiu ajn stenografa sistemo; same ĝi akceptas katolikojn, indiferece ĉu ili, en sia respektiva lando, estas membroj de la konservativa, aŭ de liberala, aŭ de speciala klerikala, aŭ eble de alia politika partio. Kaj SAT, kaj kelkaj aliaj laboristaj unuiĝoj, deklaras publike ke ili estas, kvankam proletaj organizoj, tamen « neŭtralaj » rilate al difinitaj laboristaj partioj aŭ tendencoj (komunista, sindikalista, socialdemokrata).

La neŭtrala Esperanto-movado havas nenion kontraŭ la movadoj « neneŭtralaj ». Ili certe posedas, en la nuna stato de nia afero, sian ekzistrajton. Ili sukcesis, kaj espereble sukcesos eĉ pli multe estonte, en sia speciala medio atingi rekonon kaj adeptojn, kiujn la neŭtrala movado en la samaj medioj ne sukcesus atingi. Tial ia kontraŭlaboro inter la neŭtrala kaj la neneŭtralaj Esperanto-organizoj estas sensenca, senutila, malutila, kaj kontraŭcela. Kaj tial ni ja esperas, ke estonte tiaj superflujaj atakoj kontraŭ la neŭtrala movado ne plu okazos.

P.S. — Al nia artikolo pri la « neneŭtraluloj » ni povas aldoni raporteton pri la 3-a Kongreso de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro), kiu okazis la 7.-12.8 en Parizo. La tono de tiu kongreso estis por unuiĝo de ĉiuj laboristaj esperantistoj por pli bone utiliĝi Esperanton serve al unueco inter la laboristaro de ĉiuj landoj. Plej grava decido de la kongreso estis translokiĝi la Centron al Londono (Mrs. G.M. Keable, 35 Lidfield Road,

Esperantista Lingva Komitato

Sekretario: R. de Lajarte — 4, Villa d'Orléans
Fontenay-sous-Bois (Seine), France.

Cirkulero N-ro 14 al la Lingva- komitatoj pri elektoj en la L.K.-on.

La membroj de la L.K. elirantaj en 1937 pro finiĝo de sia naŭjara periodo de aneco estas reelektitaj. Ili estas: S-roj Baghy, Belmont, Bofill, Drezén, Ghezso, Muĉnik, Uitterdijk.

Estas elektitaj en la Akademion S-roj Baghy, Belmont, Cseh, elirantaj pro finiĝo de sia naŭjara periodo, Grau Casas, Minor, Schmid, Waringhien, kandidatoj prezentitaj la 1-an de Julio 1936.

Laŭstatute okazis la ĉiutrigara baloto por elekto de la Estraro de la L.K. Voĉdonis 11 Akademianoj.

Por la posteno de Prezidanto ricevis S-roj Rollet de l'Isle 4 voĉojn, Isbrücker 4, Bailey 1, Belmont 1, nulo: 1.

Ĉar S-ro Rollet de l'Isle oficiale sciigis, antaŭ la baloto, ke li rezignas la prezidantecon, li ne estis elektebla; ĉar, aliflanke, S-ro Isbrücker, antaŭ ol akcepti la prezidantecon, esprimis la deziron, ke la plimulto el liaj kolegoj aprobulian elekton, la Akademianoj estis konsultataj. 11 respondis, el kiuj 10 aprobis. Sekve, S-ro Isbrücker estas Prezidanto.

Por la posteno de vicprezidanto ricevis: S-roj Baghy 3 voĉojn, Grau Casas 3, Bastien 2, Isbrücker 2, Waringhien 2, Cseh 1 voĉon, Rollet de l'Isle 1.

Sekve, estas elektitaj Vicprezidantoj S-roj Baghy kaj Grau Casas.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Komuna Vortaro » ricevis: S-roj W. Bailey 3 voĉojn, Schmid 1 voĉon, Waringhien 1.

Sekve, S-ro Bailey estas elektita.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Gramatiko » ricevis: S-roj Cseh 2 voĉojn, Waringhien 2, Baghy, Lippmann, Schmid, Stamatiadis, ĉiu 1 voĉon.

Sekve, ĉar S-ro Cseh estas pli malnova akademiano ol S-ro Waringhien, li estas elektita provizora direktoro ĝis kiam D-ro Lippmann povos reokupi sian postenon.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Teknika Vortaro » ricevis, S-roj Helleboid 4 voĉojn, Setala 2, Grenkamp, Inglada, Isbrücker, Minor, ĉiu 1 voĉon.

Sekve, S-ro Helleboid, Sekretario de la « Pariza Studa Komisiono por teknika vortaro », estas elektita.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Kontrolo », ricevis S-ro Rollet de l'Isle 9 voĉojn; sekve, li estas elektita.

Pro decido de la L.K., ke devas esti intertempo de ses monatoj inter la prezentado de kandidatoj kaj la baloto, estas nun prezentataj: S-roj Bailey (Th. G.), Demidjuk, Essein, Hohlov, Kühnl, Nekrasov, Privat, Rublov, Spiridoviĉ, Stojan, Wiesenfeld, F-ino Shafer, elirantaj en 1938 pro finiĝo de sia naŭjara periodo de aneco.

Ankaŭ pro decido de la L.K., ke la nombro de ĝiaj membroj ne povos superi 100, kaj ĉar ĝi estas nur 107, neniu nova kandidato estas prezentata.

Kunsido de la Lingva Komitato okazos dum la Kongreso en Varsovio, jaŭdon, la 12-an de Aŭgusto, je la 9-a 30 matene.

La Prezidanto:
J. R. G. Isbrücker.

London N. 16) kaj la organon « Sur posteno » al Belgio. Ĉeestis la kongreson inter aliaj du kunredaktoroj de « Popola Fronto » el Valencio, s-ano Azorin (pli frue en Córdoba) kaj rumana soldato el la internacia brigado, kiu alportis salutojn de gen. Mangada kaj L. Renn. Oni decidis okazigi la venontan kongreson en Barcelono.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 40. 23-an de Julio 1937.

NOVAJ DELEGITOJ.

- Aŭstralio.**
Shepparton (Victoria). — D: A. Turner, Box 81.
- Brazilo.**
Matta Grande (Alagoas). — D: D-ro A. Moreira da Silva, Rua do Commerciana 44.
São Paulo. — VD: Luiz Bolivar Fosca, Rua 15 de Novembro N° 50 — 4° and.
- Britujo.**
Glasgow (Skotlando). — FD (Fervojaj aferoj): G. Stewart, 22, Ruskin Square, Bishopbriggs.
London. — FD (Kuracistaj aferoj): D-ro A.H. Wortman, 2d Upsdell Av., London N. 13.
Loughborough (Leicestershire). — FD (Urbaj aferoj): S. Faulkner 25, Holmfield Avenue.
Rugby (Warwickshire). — D: H. Mitchell, 324, Lawford Road.
Upminster (Essex). — D: W.M. Goodes, 36, Byrön Mansions, Corbets Tey Road. (Ne plu FD en Romford pro translokiĝo.)
- Polujo.**
Lwów (Malopolska). — VD: J. Kucharz, Pierackiego 54a.
- C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario

Oficiala Informilo

N-ro 41 30-an de Julio 1937.

ĈEFDELEGITO.

- Kun bedaŭro ni devas sciigi al nia membraro, ke s-ro Rousseau, pro sia aĝo, forlasis la funkciojn de franca ĉefdelegito. Ni tre kore dankas al li pro lia ĝisnuna fervora kunlaborado, kaj deziras al li multajn feliĉajn jarojn de ripozo. Same, ni kore dankas al lia lerta adjunkto, s-ro R. Bernard, kiu tre bone plenumis la devojn de Teritoria Sekretario.
- Laŭ decido de la Konsilantaro de SFPE, la 3-an de Julio, kaj kun la konsento de la Prezidanto de IEL, la Ĉefdelegito por Francujo estas:
- S-ro Jean Guillaume, 123 Rue de Romainville, Les Lilas (Seine),
 kaj Teritoriaj Sekretarioj por Francujo estas:
- S-ro G. Bachelier, 78 Rue de Paris, Charenton (Seine);
 S-ro Mazaudon, 7 Cité Beauharnais, Paris XI.
- NOVAJ DELEGITOJ.**
- Belgujo.**
Bruselo (Brabant). — FD. (Radio): S-ino J. Plyson, Rue Jourdan 185.
Leuven (Brabant). — D: M. Wauters, Diestraat 184.
- Britujo.**
Romford (Essex). — FD. (Instruistaj Aferoj): W. G. Sankey, 53 Avenue Road, Harold Wood.
- Jugoslavujo.**
Srem. Mitrovica. — D: S. Stojanac, Zrinskog 11.
- Svedujo.**
Edsele (Angermanland). — FD. (Religio): H. Holmberg, parohestro.
- Usono.**
Emporia (Kansas). — D: S. Martin, 1025 Neosho Street.
Pharr (Texas). — D: A. Doneis, Box 433.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Julio 1937.

Asociaj Membroj	6990
Individuaj Membroj	
MJ	1044
MA	963
MAH	242
MS	132
Patronoj	13
MD	74
MH	31
	2499
	9498 en 59 landoj

Korespondantoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Julio 1937	
Ricevitaj	537
Senditaj	465
	1002

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

INTERNACIA KONKURSO

Stato je la 31-a de Julio, 1937.

	POENTOJ		
	1935	1937	%
1. Aŭstrujo	255	606	237.6
2. Norvegujo	120	209	174.2
3. Grekujo	110	137	124.5
4. Usono	1264	1382	109.3
5. Italujo	560	591	105.5
6. Hungarujo	409	504	103.0
7. Britujo	6469	6046	93.2
8. Aŭstralio	470	419	98.1
9. Belgujo	2081	1709	81.7
10. Bulgarujo	75	60	80.0
11. Azio	1615	1259	77.9
12. Portugalujo	395	297	75.2
13. Kanado	100	74	74.0
14. Sud-Ameriko	1025	729	71.1
15. Litovujo	150	105	70.0
16. Svedujo	2984	2075	69.9
17. Francujo	7909	5447	68.9
18. Nov-Zelando	210	140	66.6
19. Danujo	585	366	62.6
20. Ĉeĥoslovakujo	4040	1977	48.9
21. Nederlando	4815	2267	47.1
22. Polujo	685	278	40.6
23. Jugoslavujo	615	217	35.3
24. Afriko	395	127	32.2
25. Finnlando	195	61	31.3
26. Latvujo	265	45	17.0
27. Rumanujo	400	45	11.2
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Hispanujo	2080	15	0.7
30. Estonujo	130	—	—
		Meza	
Sumoj	41897	27224	% 65.0

Oficiala Informilo

N-ro 42 12-an de Aŭgusto 1937.

NOVAJ DELEGITOJ.

- Francujo.**
Amiens (Somme). — D: J. E. Dieulot, 32, Rue Cozette.
Besançon (Doubs). — D: P. Maillard-Salin, 7, Square St. Amour.
Gien (Loiret). — D: J. Chevallier, 16, Place des Alliés.
Nancy (Meurthe & Moselle). — Nova D: P. Neukomm, sama adr. kiel antaŭa D.
Roubaix (Nord). — D: F-ino N. Lecomte, 9, Rue des Trois Fermes, Hem.
Savigny-les-Beaune (Côte d'Or). — D: A. Nuidan.
- Hungarujo.**
Szegvár (Csongrád megye). — D: M. Czilczler.
- Maroko.**
Rabat. — D: G. Bastide, 4, Rue Alexandre Ier.
- Sud-Afriko.**
Capetown. — D: W. C. Chatters, 3, Tyne Chambers, Dorp Street.

ŜANĜOJ.

- Britujo.**
Barrow-in-Furness. — Nova adreso de la D. estas: 82, Schneider Road.
Burnley. — Pro translokiĝo provizore ne estas Delegito.
Cheltenham. — Nova adreso de la D. estas: 47, Clarence Street.

Hungarujo.

- Szentes.** — La D. translokiĝis al Szegvár (vidu supre).
- C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 43 19-an de Aŭgusto 1937.

NOVAJ DELEGITOJ.

- Aŭstrujo.**
Bregenz (Vorarlberg). — D: H. Stambader, Auf der Matte Nr. 4.
Wien. — VD: J. Reis, Kaiserstrasse 92, Wien VII.
 FD (Vitro-Arto): Ed. Weber, Kaiserstrasse 92, Wien VII.
- ŜANĜO.**
- Usono.**
San Antonio (Texas). — Pro translokiĝo provizore ne estas D.
- C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Unueco Estas Forto

Subtenu vian Internacian Esperanto-Ligon!
 Vigle varbu por ĝi individuajn membrojn!

Esperanto en la Jamboreo

Kiam estis certe ke la Jamboreo estos en Vogelenzang (Nederlando), la nederlandaj verdaj kavaliroj eklaboris. Ĉiu en propra maniero kaj kune skoltfesto Sed, ho ve, ne Lordo Baden Powell estis kontraŭ Esperanto sed la nederlandaj skoltgastigantoj ne ŝatis nian lingvon, kaj do helpon niaj samideanoj ne ricevis!

Tiam ni eklaboris inter la skoltoj individue. Ankaŭ tio estis malfacila laboro, sed kelkaj sukcesis kunigi 6 ĝis 8 knabojn por instrui al ili nian lingvon.

Fine estis la 31-a de julio, kaj la granda skoltfesto komenciĝis. Kie estis la esperantistaj skoltoj? Neniu sciis. Kelkaj promesis veni, sed neniuj estis certa, ĉu ili venis aŭ ne. Kion fari?

Estas la granda merito de s-ino Verhaegen el Rotterdam, la skoltfratino, ke ni renkontis la eksterlandajn samideanojn. Ŝi vagis tra la grandega tendaro por renkonti ilin. Kiu konis la grandan terenon, nur tiu povas bone taksii la grandan meriton de tiu fervora helpantino. Ne granda estis la sukceso, sed ŝi tamen havis. Estas la merito de skolto Mesritz, ke nun okazis kunsido. Li sukcesis enpresigi en la tendargazeto «Jamboree-Post» alvokon al nomita kunsido.

Oni kunsidis. En la mezo la standardo. Solene oni kantis la himnon. Parolis kelkaj skoltoj. Estis interesplena kunveno. Oni disiĝis. Sed rigardu! Jen alproksimiĝas aŭtomobilo. Estas la raportaŭtomobilo de K. R. O. (Katolika Radio-Send-

stacio). Ho, kia feliĉa! En ĝi estas stelo. Li vidis la standardon. Kio okazas tie? li demandis. Oni rakontis. Tion mi eternigos; pri tio mi faros diskon por la disaŭdigo. Nun oni baldaŭ denove scenigis la kunsidon, kaj surdiskigado komenciĝis. Parolis svedo kaj anglo, oni kantis i.a. la jamborekanton en Esperanto, kaj post kelkaj tagoj Tutnederlando priaŭskultis la disaŭdigon de la samideanoj en la jamboreo. Niaj fidelaj s-ino Verhaegen kaj s-ro Mesritz certe meritis tiun sukceson. Ni gratulas.

Ekestis la lasta tago de la skoltfestoj. Por la lasta fojo ni iris al la tendaro por ekzameni, ĉu estas eble trovi skoltsamideanon. Ankaŭ nun ni havis feliĉon. Ni trovis skoltestron el Tirolo. Li estis surprizita vidi nin. Li tuj kuniris kun ni. Kien? Ni klopodos renkonti samideanon el Budapeŝto. Post longe vagado inter la tendoj ni atingis la hungaran subkampojn. Sed, ho ve, pro la geprinca vizito al la lasta tendarfajro ne estis permesate al neskoltoj eniri la terenon. Ni alparolas la policestron kaj klarigas al li la situacion. Li estis saĝa viro. Li portis tri butonojn sur la kolumo. Li donis permeson. Nun ni venkas ĉiujn aliajn policestron. Nun ni venkas ĉiujn aliajn policestron. La hungara amiko estis ĝoja vidi nin, li mankis la inojn. Ni parolas iomete, kaj nun li invitas nin en sian tendon. Tie (li estis la tendarkuiristo) li serĉis kaj trovis inter multaj objektoj botelon. Sur la etiketo ni kaŝe legas: Tokajer 1924. La

aŭstria lekas siajn lipojn. En ordinaraĵoj nia gastiganto dividas la enhavon de la botelo. Kaj simple sed korusu ni tintigas la glasojn kaj trinkas je la bonfarto de la jamboreo, Esperanto kaj Hungarujo.

Ni forlasis la tendaron. Montriĝis ke la sfero de la samideanoj ankoraŭ estas Zamenhofa. Ke ankaŭ en la jamboreo estas Esperanto. Ĝi nur devas kreski en tiu rondo.

Faru ĉiu sian devon, tiam en la sekvonta jamboreo oni levos inter la naciaj flagoj ankaŭ la Verdajn Standardon.

J. D. Braĥel.

La vera fabelo

Iam estis sinjoro, kiu lernis Esperanton. Li aŭdis pri internacia frateco kaj internacia organizacio kaj legis en la statuto pri « plifaciligi la rilatojn inter la homoj » kaj « kreskigi fortikan ligilon de solidareco ».

Plenespere li pakis siajn kofrojn kaj ekvojaĝis por viziti siajn fratojn trans la limo. Alveninte antaŭ la pordo de sia unua amiko, li sonorigis modeste. Li ne bezonis tiri forte, ĉar li vidis la amikon en la antaŭĉambro. La amiko tamen ne malfermis la pordon. Kredante, ke la sonorigado estis tro modesta, li tiris denove, sed nun iom pli forte. Malgraŭ tio la pordo restis fermita. Opiniante, ke la amiko estas surda, li tiris nun tre forte kaj... la pordo malfermiĝis.

Montriĝis, ke la amiko ne estas surda, sed li ne havis tempon pli frue malfermi la pordon.

La akcepto estis cetere sufiĉe agrable kaj en bona harmonio oni disiĝis.

La nova esperantisto daŭrigis sian vojaĝon. Alveninte ĉe la dua amiko, li spertis denove, ke modeste sonorigi ne sufiĉas. Li tamen estis energiulo. La akcepto estis simila al la unua.

La tria vizito tamen estis elrevido. Kvankam li estis tre certa, ke iu estas hejme, oni ne malfermis la pordon. Poste en internacia kongreso li aŭdis, ke oni estis aŭdinta lin, sed pro manko de tempo ne estis eble malfermi la pordon.

Kara leganto: Ĉi tiu fabelo ŝajnas al vi ne-vera. Vi pravas. La sinjoro ne pakis siajn kofrojn — ne vojaĝis multajn kilometrojn por finfine vane resti staranta antaŭ la pordo de sia amiko. Li nur sendis leteron kun respondkuponon al tiuj, kiuj sin anoncis oficiale kiel estraron kaj delegiton de la Esperanto-movado.

Kelkaj respondis post monatoj kaj kelkaj estas ankoraŭ respondontaj.

Laŭ historia vidpunkto la fabelo do estas fabelo. La morala flanko tamen restas.

Hans Bakker.



Esperanto-stando ĉe la Bruĝa Foiro.

Bruga Grupo Esperantista, Reĝa Societo (fondita dum 1902, aliĝinta al Reĝa Belga Ligo ekde 1905) havis tiun ĉi belan standon ĉe 3-a Komerca Foiro de Brugge (Bruges), Belgujo. Tiu budo estis inaŭgurata de s-ro H. Baels, Provincestro de Okcidenta Flandrio, subtenanta membro de la grupo, kaj tie dum 10 tagoj miloj da vizitantoj interesiĝis pri Esperanto.

Mallongaj Informoj

La 25-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj

okazos la 20-23 novembro 1937 en la ĉefurbo Tokio. Oficejo de la Organiza Komitato estas la Japana Esperanto-Instituto. Jen la provizora programo:

La 20-an de novembro: 14.00 h. malferma soleno; 19.00-20.00 festeno; 20.00-22.00 amuzajoj; la 21-an de novembro: antaŭtagmeze fakkunsidoj (fervoĵista, virina, medicina, farmacia, elektroteknika, studenta, pedagogia); 13.00 ĝenerala kunsido de JEI, unua labor-kunsido; 19.00-20.30 raportoj de JEI-komitatoj kaj LK-anoj; 20.30-22.00 kongresa universitato; la 22-an de novembro: antaŭtagmeze rigardo de la urbo; 13.00 dua labor-kunsido; la 23-an de novembro: antaŭtagmeze fakkunsidoj (budhista, kristana, literatura, scienca); posttagmeze propagandaj paroladoj; vespere raportoj de la fakkunsidoj, ferma soleno.

Internacia Konferenco pri Internacia Helplingvo 1940 en Tokio.

Propono de Int. Auxiliary Language Association.

S-ro Harry Edmonds, direktoro de International Auxiliary Language Association (IALA), alveninta en Japanujo por intertrakti pri konstruo de « Internacia Domo » en Tokio, invitis esperantistojn por preparolo. La 26-an de majo vizitis lin s-ro Ossaka kaj kelkaj aliaj. S-ro Edmonds proponis, en la nomo de IALA, ke japanaj esperantistoj organizu internacian konferencan pri la problemoj de lingvo internacia en Tokio okaze de la multe preparolata jaro 1940 (jaro de la Olimpiaj Ludoj en Tokio). La propono estis, post pripensado, akceptata tiel, ke japanoj kiel eble plej multe klopodos por la efektivigo.

Por fari la unuan paŝon de la preparo, oni decidis havi kunvenon por informiĝi pri IALA pere de s-ro Edmonds en la fino de junio.

American Association for International Science.

Proponita Fakorganizado en Usono.

Elektro-inĝeniero kaj instruisto s-ro Lawrence A. Ware, IEL-delegito en Bozeman (Montana), Usono, proponas starigi novan fakorganizon por Usono sub la nomo « American Association for International Science ». S-ro Ware estas ankaŭ usona delegito de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, kaj li opinias, ke, por pli efike disvastigi Esperanton inter la sciencistoj de Usono, la lando bezonas nacian fakorganizon.

El anglalingva propagandfolio oni trovas ke la celoj de la nova asocio estas: 1. La internaciigo de la Scienco; 2. la teknika pliboniĝo en la Scienco; 3. la pli intima kunlaboro inter la Scienco kaj la Socio. El tiuj tri punktoj AAIS intencas akcenti la unuan. Ĝenerale oni povas konsideri la organizon kiel ilon kiu celas kunigi la du kampojn: Internacia Scienco, kaj la Studo de Scienco. Ĝis nun inter tiuj du staris kiel malhelpo al progreso la lingvaj kaj naciaj baroj.

Kvankam la asocio propagandos ĉefe en usonaj sciencaj rondoj, oni plezure ricevas la helpon kaj konsilon de alilandaj sciencemaj samideanoj, kaj jam subtenas la klopodojn konataj esperantistaj sciencistoj en Usono. Membroj de la asocio ricevos laŭ elekto aŭ la Bultenon de la Internacia Scienca Asocio Esperantista aŭ Sciencaj Gazetoj. La adreso de s-ro Ware estas: 309, W. Harrison Street, Bozeman (Montana), Usono.

Ĝenerala adresaro de blindaj esperantistoj.

Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj (UABO) ĵus eldonis ĝen. adresaron por la 1937, kiu enhavas entute 1624 nomojn el 38 landoj, dum la adresaro de 1913 elmontris 811 nomojn de 27 nacioj. Komparante la statistikon laŭ landoj, ni povas konstati, ke la nombro de niaj nevidantaj verdaj batalantoj prezentiĝas sekve: Svedujo 143 (94); Nederlando 139 (0); Francujo 128 (51); Hungarujo 103 (5); Ĉeĥoslovakio 100 (48); Anglujo 91 (92); Germanujo 96 (189); Norvegujo 79 (51); Jugoslavio 69 (0); Polujo 63 (0); Hispanujo 58 (35); Rumanujo 53 (8); Bulgarujo 59 (1); Danujo 45 (29); Italujo 45 (8); Finnlando 39 (28); Belgujo 38 (58); Sovjetujo 35 (8); Aŭstrujo 35 (26); Portugalio 23 (0); Latvio 17 (0); Estonio 16 (0); Skotlando 16 (49); Svisujo 11 (10); Irlando 5 (2); ekster Eŭropo: Usono 55 (34); Japanujo 21 (0); en aliaj mondpartoj: 24 (14).

UABO petegas ĉiujn vidantajn gesamideanojn efike helpi ĝin en la penado esperantigi pli multe da nevidantoj en ĉiuj landoj, precipe informojn petu la sekretarion de UABO: s-ron red. Harald Thilander, Stocksund, Svedujo.

Dankŭaldo al Louis Braille.

Ni ĵus eksciis, ke, laŭ iniciato de Pariza blindulo, s-ro Camille Delanerie, oni monkollektas por starigo en la franca ĉefurbo de monumento, dankmemore al Louis Braille. Tiu bonfarinto konsistigis, per reliefaj punktiliteroj, la nun tutmonde uzitan alfabeton, dank'al kio povas la blinduloj, almenaŭ intelekto, eligi el la mallumo, al kiu ilin katenas la blindeco: ili ja legas, skribas, studas, korespondadas, kiel la vidantoj.

Ĉiuj esperantistoj konsideru kiel propagandan ŝuld-devon, partopreni tiun honorigon, monofarante, tial ke alia bonfarinto, bedaŭrata Profesoro Th. Cart, adaptante al Esperanto la Braille-an alfabeton, forigis la lastan baron — la lingvan — inter la blinduloj de lando al alia.

Kolektas la monoferojn de esperantistoj f-ino Cécile Royer, 105, rue Faubourg Saint Denis, Paris (poŝta konto 257.77, Paris), kiu transdonos kaj antaŭdankas pri eĉ plej malgravaĵoj sumetoj. (Oni bonvolu nepre montri la tialon de la mensendo.)

Eksiĝo de valora kunlaborinto pro malsano: S-ro Baas, prezidanto de LEEN.

t. e. la nederlanda Esperanto-asocio « La Estonto Estas Nia » aliginta al IEL, estas malsana pro nerv-elĉerpiĝo kaj tial devis eksiĝi kiel prezidanto de LEEN. Ĉiu, kiu konas la malfacilajn cirkonstancojn, en kiuj li ekprenis la direktilon de la nederlanda Esperanta ŝipo por manovri ĝin en pacan havenon, ekaŭdis lian decidon kun ĉagreno. Li laboradis senlace kaj energie por la Zamenhofa ideo, sen ia persona gloro aŭ profito, ĝis elĉerpiĝo, kaj li meritis tial la dankon de la tutmonda samideanaro.

Ili ĝuos belan senpagan vojaĝon al Italujo.

Itala Ministerio por la Gazetaro kaj la Propagando (Ĝenerala Direkcio por la Turismo) ĵus publikigis la nomojn de la ĉefpremiitoj en la tria radio-konkurso. Inter ili estas niaj samideanoj Akiel De Martelaere en Gent Belgujo (unua premio) kaj D-ro Wilhelm Solzbacher en Bèrelange/Luxembourg (Luksemburgo).

Ni kore gratulas!

La Libro-Klubo « Epoko ».

Lastatempe en Britujo naskiĝis kaj trafis grandan sukceson diversaj naciaj libro-kluboj, kiuj celas havigi al siaj membroj librojn je relative malaltaj prezoj. Tiaj kluboj ĉiumonate eldonas novan libron, kiu estas vendata al la membroj por 2 ŝ. 6 p. (2.50 sv. fk.). La membroj promesas aĉeti la monatan libron dum minimume ses monatoj, kaj ili pagas por ĉiu libro nur post ricevo. La kluboj povas malmultekoste eldoni la librojn, ĉar ili scias jam antaŭe ĝuste kiom da libroj ili devos presigi. La plej sukcesa el tiaj kluboj en Britujo estas la Left Book Club (Maldekstra Libro-Klubo), kiu, kiel diras la nomo, eldonas librojn laŭ « maldekstra » ideologio. Kvankam tiu klubo ekzistas nur iomete pli ol unu jaron, ĝi havas preskaŭ 50000 membrojn.

La direktoroj de la Esperanto Publishing Company konstatis la sukceson de tiu sistemo kaj opiniis, ke ĝi povus esti tre efike aplikata al Esperanto-libroj. Ili do stragis la Libro-Klubon « Epoko », kiu dumonate havigos al siaj membroj libron proksimume 200-paĝan (18x 11,5 cm.), bone presitan kaj bruŝuritan je ia por Esperanto-libroj tre malalta prezo de 1 angla ŝilingo. La unua libro aperos en oktobro kaj estos « Murdo en la Orienta Ekspreso » de Agatha Christie. Tiu rakonto estas unuaklasa moderna detektiva romano, kiu nepre tenas la atenton de la leganto de la unua paĝo ĝis la lasta, kaj la tute internacia atmosfero aparte interesos esperantistojn.

Speciala poŝta stampo por Esperanta ekspozicio en Leuven/Louvain (Belgujo).

De la 18-a ĝis la 20-a de septembro okazos grava Esperanta Ekspozicio en Leuven (Belgujo). La Lovena Urbeŝtaro oficiale disponigis al la organizantoj la suban salonegon de la Palaco de Belaj Artoj. Siaflanke la Centra Poŝtŝtaro aranĝos, en la ejo de la Ekspozicio specialan poŝtofecejon, kiu uzos, por ŝtampi la sendotaĵojn, specialan ŝtampilon kun teksto en Esperanto. Okaze de tio estos eldonataj du diversaj memoraj poŝtkartoj, afrankitaj per poŝtmanko de 0.35 belg. fk. kaj stampitaj per la speciala stampilo.

Nova organizo: IFREAD.

Dum la Internacia Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo » fondiĝis la Internacia Federacio de Radio-Esperantistaj Asocioj kaj Delegitoj, IFREAD. Ĝi bezonas delegitojn en ĉiuj landoj. Interesuloj nepre skribu tuj al la Radio Klubo Esperantista de Francujo, 26 avenue Dode de la Brunerie, Paris, 16, Francujo.

Ni funebras

— S-ano E. L. SOUTHWICK, 135 Middle St., en Braintree, Mass., Usono, mortis la 30-an de aprilo nunjara. Li ripozu pace!

— S-ino FRANCINA ANTONETTA MOREAU, nask. Assendorp, edzino de nia samideano A. L. Moreau, Velperweg 90c, Arnhem, Nederlando, subite mortis la 3-an de aŭgusto 1937, je aĝo de 56 jaroj. Koran kondolencon al la funebrantaj edzo kaj gefiloj!

— S-ro NATAN NATHANS, Amsterdam, Nederlando, mortis la 28-an de julio per akcidento de aeroplano, kiu postulis ankoraŭ 14 pliajn homvivojn. Li naskiĝis en 1883 kaj konatiĝis kun Esperanto antaŭ pli ol dek jaroj. Li estis grava funkciulo de la internacia transportlaborista movado, kiu eldonas ankaŭ esperantlingvaj « Komunikojn por la Gazetaro ». La funebran kunvenon pro la tragedia morto de s-ro Nathans ĉeestis mil personoj, inter ili de la Int. Labor-Oficejo kaj de la hispana registaro. Pacon al lia cindro!

Esperanto tra la mondo

La sekvantaj artikoloj estas destinitaj por aperi, tradukitaj, en nacilingvaj gazetoj. Bonvolu kiel eble plej multe uzi ilin por tiu celo!

Lingvo festas sian 50-jaran naskiĝtagon.

En tiuj ĉi tagoj estas pasintaj 50 jaroj, de kiam aperis en la mondo nova lingvo: la internacia lingvo Esperanto. Kvankam 50 jaroj en la historio de lingvo signifas ne grandan tempospacon, tamen la lingvoprojekto de la pola okulkuracisto D-ro Zamenhof trovis en tiu mallonga tempo mondskalan disvastiĝon kaj fariĝis jam vere vivanta lingvo. Pluraj milionoj jam lernis tiun lingvon, dekmiloj konstante uzas ĝin apud sia nacia lingvo, legante, korespondante aŭ vojaĝante, kaj pluraj miloj ĉiujara renkontiĝas ĉe diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj kaj libertempejoj. Ekzistas en tiu lingvo jam multaj libroj kaj aperas multaj gazetoj, inter ili unu semajna gazeto en tagjurnalformato, kiu eliras regule ekde la jaro 1920. Esperanto estas instruata en sennombraj kursoj, ĝi estas flegata en miloj do kluboj, multaj gravaj korporacioj kaj internaciaj organizoj ĝin aprobas, kaj ĝiaj ŝancoj por fariĝi la dua lingvo por ĉiu (la unua fremdlingvo) apud la gepatra lingvo kreskas konstante. Kiam ĝi estos ĝenerale enkondukita, ĝi sendube fariĝos por la homaro eĉ pli granda beno ol la enkonduko de la presarto.

Jubilean poŝtmarkon por memorigi la Oran Jubileon de Esperanto

eldonis la Poŝta Administracio de Brazilo. La poŝtmarko montras la terglobon, ĉirkaŭligitan de rubando kun surskribo: ORA JUBILEO DE ESPERANTO. La poŝtmarko havas valorindikon de 300 rejsoj. Ĉi tiu estas jam la kvara poŝtmarko kun Esperanto-teksto, eldonita de la brazila Poŝto.

La Jubilea Kongreso de Esperanto

fariĝis antaŭ kelkaj semajnoj en Varsovio, la urbo kie laboris kaj kie estas enterigita la kreinto de tiu ĉi lingvo, D-ro L. L. Zamenhof, kaj el kie ĝi antaŭ 50 jaroj komencis sian triumfiron tra la mondo. Partoprenis ĉ. 1100 kongresanoj el 30 landoj. Okazis vizitoj al la tomboj de D-ro Zamenhof kaj de lia unua adepto Grabowski. La Kongreso akceptis rezolucion pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La venonta (30-a) Mondkongreso de l' esperantistoj okazos venontjare en Londono. Por 1940 estas projektite aranĝi la Mondkongreson en Tokio.

El Saŭlo fariĝis Paŭlo.

Samtempe kun la 29-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta antaŭ kelkaj semajnoj en Varsovio, tie havis lokon ankaŭ la 14-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj, kiun partoprenis blinduloj el 14 landoj. Okazis dum unu kongreskunsido, ke pensiita kolonelo, s-ro Klobukowski, kiu devis saluti en la nomo de iu blindula organizo Varsovia, parolis kontraŭ Esperanto kaj ĝia uzado inter blinduloj. Dum la kongreso la kolonelo interesiĝis pri ĉiuj laboroj, kaj li konvinkiĝis ke ili estas fareblaj nur dank' al Esperanto, kiu kapablas solvi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj.

Esperanto — vivanta lingvo.

De jaro al jaro plimultiĝas la internaciaj kunvenoj de esperantistoj, kaj de jaro al jaro Esperanto pli fariĝas vivanta lingvo. Pentekoston okazis en Parizo la grava Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », vizitita de 600

delegitoj el 22 landoj. Antaŭ kelkaj semajnoj finiĝis en Varsovio la 29-a Universala Kongreso de Esperanto, kun 1100 partoprenintoj el 30 landoj. En Nederlando okazis samtempe du internaciaj fakkongresoj esperantistaj: katolika en Hago kun proksimume 400, kaj laborista en Roterdamo kun pli ol 800 partoprenantoj. Krom tio estis aranĝitaj internaciaj esperantistaj libertempejoj en dekduo da lokoj diverslandaj, el kiuj kelkaj havis neatendite grandan sukceson: en Helsingör (Danlando) libertempis 210 esperantistoj el 14 landoj (intra ili 160 eksterlandanoj), en alia dana loko Fuglsø 180 el 11 landoj.

Esperanto en tria vico ĉe konkurso de Radio Roma.

Laŭ la aŭtentikaj ciferoj pri la tria turisma konkurso de Radio Roma, estis ricevitaj por la konkurso 209 verkaĵoj en la lingvo franca, 163 en la germana, 101 en Esperanto, 68 en la angla kaj 61 en la nederlanda. Du esperantistoj ricevis kiel premion senpagan restadon en Italujo, nome unu konata artpentristo en Gent (Belgujo) kaj unu redaktoro en Luksemburgo.

Nederlanda Poŝto eldonis bildpoŝtkartojn kun Esperanto-teksto.

Sekvante la ekzemplon de la aŭstra, brazila kaj aliaj poŝt-administracioj, nun ankaŭ la nederlanda poŝto eldonis serion de 24 novaj ilustritaj poŝtkartoj kun surprisita poŝtmarko. La klariga teksto de la poŝtkartoj estas en la lingvoj nederlanda kaj Esperanto.

Ĉeĥoslovaka Poŝto propagandas por Ĉeĥoslovakio per poŝtkartoj kun Esperanto-teksto.

Ĉeĥoslovaka Poŝto eldonis bildkartan serion sub la devizo: « Ekkonu vian patrujon! Propagandu ĝiajn belaĵojn helpe de la poŝto! ». En tiu ĉi serio troviĝas du kartoj, kies surskribo estas presita, krom en la lingvo ĉeĥa, ankaŭ en Esperanto. Estas kartoj pri banloko Lazne Belohrad kaj pri la urbo Brno — du lokoj havantaj specialan rilaton al la Esperanto-movado.

Novaj turismaj broŝuroj en Esperanto.

Pli kaj pli multe uzata estas Esperanto por turisma reklamo. Novajn bone presitajn kaj bele ilustritajn Esperanto-broŝurojn porturismajn eldonis la polaj urboj Warszawa, Kraków, Vilno, Gdynia, kaj Krynica; la urbo Wien (Aŭstrio), la Ministerio de Komerco (turisma sekcio) en Praha (Ĉeĥoslovakio), la Internacia Ekspozicio en Paris (Francujo), kaj la banadministracio de Kuressaare (Estonio). La nova broŝuro de la ĉeĥoslovaka komerca ministerio havas la titolon: « Vizitu Ĉeĥoslovakion! Ĉeĥoslovaka esperantistaro vin atendas! »; ĝi donas tre klaran superrigardon pri la ĉeĥoslovaka lando, loĝantaro ktp.

Esperanto-stando ĉe la Foiro de Brugge/Bruges (Belgujo).

Dum la 3-a Komerca Foiro de Brugge/Bruges en Belgujo estis starigita ankaŭ Esperanto-stando, kiun inaŭguris la provincestro de la provinco Okcidenta Flandrio. Miloj da personoj vizitis la standon kaj interesiĝis pri Esperanto.

Esperanto instruata en 1142 lernejoj de 40 landoj.

Laŭ ĵus publikigita statistiko de International Auxiliary Language Association, New York, asocio por scienca studado de la problemoj de lingvo internacia, kaj ne propagandanta difinitan projekton, en la lastaj dek jaroj Esperanto estis, aŭ ankoraŭ estas, instruata en 1142 lernejoj de 40 landoj entute; 8564 instruistoj en 66 landoj scipovas tiun helpilingvon. Kvankam la statistiko estas ne tute kompleta, ĝi parolas tre konvinkan lingvon.

Adresaro de blindaj esperantistoj

estas ĵus eldonita de Universala Asocio de Blindul-Organizoj, Stocksund, Svedujo. La adresaro enhavas 1624 nomojn en 38 landoj. Simila adresaro, aperinta en 1913, enhavis nur 811 nomojn en 27 landoj.

Japana « patriotisma poŝtmarko » iniciatita de esperantisto.

Japana esperantisto, studento Eiji Doi, iniciatis antaŭ kelkaj jaroj la eldonon de « patriotisma poŝtmarko ». Nun lia propono estas efektivigita, helpe de parlamentano, Prof. S. Uĉigasaki.

Ok naciaj lingvoj, kaj tamen nur Esperanto helpis.

Pri interesa okazintaĵo raportas egipta korespondanto de la semajna gazeto « Heroldo de Esperanto », aperanta en Hago (Nederlando): Maristo eniris ĉitiean (t.e. en Port Said) butikon por aĉeti fotografilon, sed tute ne komprenis iun el la provitaj lingvoj angla, franca, germana, araba, itala, greka aŭ hebrea. Klubano (t.e. de la Esperantista Klubo) hazarde ĉeestis kaj ŝerco kaj senespere provis Esperanton — kaj plene sukcesis! La maristo estis bulgare scianta nur la du lingvojn: sian gepatran kaj Esperanton. Do, el naŭ lingvoj inkluzive de la plej disvastigitaj nur Esperanto estis komuna al ambaŭ personoj.



*En monato septembro
Elferoras grupmembro
Amendumas, aklamias,
Ĝed ĉu legi li amas?
Tiu, dum liaj amuroj
Malsategas la Murtoj?
Se li legi ne amas
La fervoro ja lamas*

Petu prospekton de
HEROLDO DE ESPERANTO
Scheveningen — (Nederlando)

La Esperanto-Literaturo kreskas

Muusses Esperanto-Biblioteko. Ĉiu serio embleksas 10 volumetojn. Unuopa volumeto kostas 0.35 guld.; tuta serio 2.50, inkl. send-kostoj. Formato 13x20 cm.; amplekso de unuopa volumeto 32-36 paĝoj. — Eldonas: J. Muusses, Purmerend (Nederlando). — Havebla de la Libroservo de Heroldo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. (Recenzo pri vol. 1-3 vidu en Heroldo n-ro 20/927 kaj la julia numero de E.I.)

N-ro 4: Tra Usono kun ruliĝanta hejmo. — Verkis Joseph R. Scherer.

Kiu legis la libron « Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo » de Scherer kaj en Heroldo liajn diversajn vojaĝraportojn ĉiam vivajn, virlajn kaj brilkolorajn, tiu kun ĝojo salutos ĉi tiun verketon; ĝi estas iel ligita al lia libro. Ĉi foje ni veturas kun nia samideano tra la tuta Usono (100.000 km.) en lia ruliĝanta hejmo.

La stilo estas klara, simpla, flua. Scherer evidente malŝatas komplikajn frazperiodojn kaj ne favoras la neologismemon.

N-ro 5: El la klasika periodo de Esperanto. — Verkis Julius Glück.

Iam ni estis amiko de esperantisto, kiu ne tre ŝatis legi Esp.-librojn kaj kiu speciale abomenetis dikajn volumojn. Komprenoble li ne estis leginta « La Faraonon », kaj nur pene mi povis lin konvinki, ke almenaŭ ĉi tiun libron, kvankam 3-voluman, li devas legi. Li fine komencis kaj — ho miraklo! — ne plu ĉesis. Sinsekve li traigis la tutan ampleksan romanon. Ne nur la streĉa enhavo, sed same ankaŭ la majstra lingvaĵo de la traduko de Kabe lin estis ĉeninta.

Pri tio mi pensis, kiam mi ekprenis la 5-an volumeton de M.E.B., per kiu la verkinto Glück « celas iomete malfermi la pordon al la spirita laborejo de du grandaj Esperantaj verkistoj »; sen ilia kunlaboro la nuna alta grado kaj perfekteco de nia lingvo eble ne estus jam atingita.

Antoni Gr a b o w s k i, persona amiko de l' majstro, antaŭa volapükisto kaj poste Esp.-propagandisto, organizanto kaj ĉefe verkisto, estis tiu, kiu la unuan fojon parolis Esperante kun D-ro Zamenhof.

Granda estis lia laboro sur la verda kampo, sed el lia verkaro elstaras la traduko de la pola nacia epopeo « Sinjoro Tadeo ». En ĝi li preparis novajn vojojn al nia poezia lingvo.

La dua persono el la klasika periodo estas D-ro Kazimierz Bein (K a b e), majstro de prozo, uzanto de simpla, ĉarma esprimmaniero, kiu lin plej alproksimigas al tiu de D-ro Zamenhof. « Bona sinjorino » kaj « La interrompita kanto » estis la unuaj literaturaĵoj en Esperanto kiujn la recenzanto legis en sia Esperanta infaneco.

La libreto estas precipe interesa, ĉar la verkinto konis persone kaj Grabowski'n kaj Kabe'n; li rakontas el sia sperto pri ili. Tio antaŭ ĉio interesos la junan verdan generacion, de kiu jam iomete distancas la klasikaj figuroj de Kabe kaj Grabowski.

N-roj 6/7: La kongresaj paroladoj de D-ro L. Zamenhof.

Estis salutinda ideo, meti en la kolekton de M.E.B. la kongresajn paroladojn de nia majstro. Tiamaniere ili estas facile kaj malmultekoste akireblaj de ĉiu esperantisto — kaj kiu dubas, ke ĉiu samideano kaj samcelano devas ilin koni? En du volumetoj ili estas enhavataj, bedaŭrinde ne ĉiuj; la parolado en Krakovo, 1912, troviĝas en volumeto n-ro 10. Kia ajn estas la kaŭzo, tiu aranĝo ne trovas ĉies plaĉon.

Kiel aldone troviĝas en la kajero 7 la, cetera jam tre ofte kaj diversloke reprints, « Letero pri la deveno de Esperanto » al Borovko.

Jofebo.

Vilém Werner: Homoj sur flosglacio. Komedio en tri aktoj. 109 p. 15x21 cm. Prezo 12 ĉ. kronoj, bindita. Eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc. Mendebla por unu guldono (inkl. afranko) ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Libro, en plaĉa formo eldonita, kiel estas kutime rilate la verkojn de la Moraviaj Pioniroj, kies fervoro estas konata. Estas malfacile diri ion pri komedio. Des pli ni povas rekomendi la aĉeton, precipe por grupoj kiuj volas ilustrati iun vesperon per teatro-ludaĵo. Tiuokaze oni havas ĉi tie verkon pli indan ol la ludetojn, en kiuj ia esperantisto aperas sur la scenejo por konverti la ĉeestantojn al la sankta idealo. Eble oni povus rimarkigi ion rilate la lingvon de la traduko, kiu enhavas kelkloke iom strangan, ne tuj kompreneblan esprimon (vidu ankaŭ la rimarkon en la libro mem sur paĝo 111). Felice tamen ĉi tio ne malhelpas la iron de la komedio.

Joh. Hartog.

F. Faulhaber: Gebonden stijl. Een en ander over poëzie in Esperanto. 39 p. 14 x 22 cm. Prezo guld. 0.35. Eldonis Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Postbus 0. 50, Amsterdam.

Libreto, kiu celas instrui la diversajn specojn de verso. Post tre populara enkonduko sekvas ekzemploj de ĉiuj rimpiedoj, skemoj ktp. Por iu, kiu ŝatas la skemon de poemo pli ol la enhavon, ĉi tiu libreto povas taŭgi. Komprenoble ia scio pri la materio estas necesa, sed ekzistas, laŭ mia opinio, jam sufiĉe da libretoj sur tiu ĉi tereno. Kelkajn valorajn rimarkojn mi trovis en la fino, kiam la aŭtoro konsilas provizore ne rimi, ne skribi versojn. Kaj ankaŭ, kiam li konstatas, ke en la nuna poezio la apostrofo abundas.

Joh. Hartog.

Arthur Domènech: Poemoj. 36 p. 11x15,5 cm. Kun portreto de la aŭtoro. Prezo unu peseto, ĉe s-ro Jaime Grau Casas, Aigüesbones (Katalunujo), Hispana Respubliko.

Per tiu ĉi malgranda libreto, kiu tamen enhavas kelkajn perlojn de ampoezio, Jaime Grau Casas metas modestan monumenton al sia tro frue forpasinta bopatro Artur Domènech.

La libreto enhavas poemojn el la jaroj 1914 ĝis 1931. Malmulte oni aŭdis pri la aŭtoro dum lia vivtempo. Li ne, kiel la plimulto de la Esperanto-poetoj, rimis kaj tuj publikigis. Lia poezio pro tio estas pli funda ol la ordinara Esperanto-poezio. La versaĵoj de Domènech certe meritus eldonon en malpli modesta formo.

Joh. Hartog.

Alois Norbert: La mondo ridas. Bonhumoraj poemoj, deklamaĵoj por Esperanto-grupoj. 64 p. 10x16 cm. Prezo unu ŝilingo aŭ 2 resp.-kup., ĉe la eldoninto Alois Norbert, poste restante, Postamt 37, Wien, Aŭstrio.

Aro da rimajoj, lertete verkitaj kaj sufiĉe flue legeblaj. Kiel ofte, la malpli longaj estas la plej spritaj. Tamen kelkloke oni havas la impreson, ke la aŭtoro enigis plurajn komikaĵojn nur, por ke la libreto estu plena.

J. H.

Esperanto. Books in Esperanto and on the study of Esperanto. Manchester Public Libraries. 7 p. 22 x 14 cm. — Presita katalogeto pri Esperanto-libroj legeblaj aŭ lupreneblaj ĉe la Publika Biblioteko de Manchester, Anglujo.

Kion vi faras por eviti tion? Geesperantistoj el la tuta mondo agu energie kontraŭ la internacia faŝismo! — Tio estas la teksto de diverskolora afiŝego (100 x 70 cm), eldonita de Commissariat de la Generalitat de Catalunya, Barcelona, Hispanujo, kaj supozeble ricevebla de tie senpage. Ĝi montras du pugnojn kun faŝistaj insignoj; ili ponarde celas la grandparte enkatenan Madridon.

Sokola kongres-afiŝo aperis en Esperanto (65 x 95 cm.). Jam dum la pasintaj sokol-kongresoj en Praha estis eldonitaj Esperantaj propagandiloj. Ankaŭ nunjare la ĉeĥoslovaka sokol-asocio eldonis efikan esperantlingvan afiŝegon por la 10-a tutsokola kongreso, okazonta en la jaro 1938 en Praha. Informojn kaj afiŝojn petu de: Československá Obec Sokolská. « Tyršuv Dum », Praha III, Ĉeĥoslovakio.

Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro eldonis interesan murafiŝon (70 x 45 cm.) kun teksto en la ĉefaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto, pri la 10-a Internacia Specimena Foiro de Rio. La sekretario de la Foiro ĝin disdonas al la ĉefaj gazetoj kaj asocioj. Kiu volos ricevi senpage la esperantlingvan eldonon, bonvolu sendi ilustritan poŝtkarton al: Diretoria de Turismo e Propaganda, Avenida das Nações, Rio-de-Janeiro, Brazilo. (Estas en preparo bela ilustrita prospekteto pri la venonta Foiro kun 32 ilustraĵoj kaj ĝia ĝenerala plano; bonvolu de nun peti ekzempleron de la eldono en Esperanto!)

La Juna Vivo. Internacia kantarono. 62 p. 16 x 12 cm. Prezo 0.35 guld. ĉe « La Juna Vivo », West-Graafdiijk, N.-H., Nederlando.

Bona preso, plaĉa aranĝo, malalta prezo kaj, antaŭ ĉio, la valora enhavo rekomendas tiun kantlibreton. La kantoj aperis en la tri jarokolektoj de « La Juna Vivo », monata organo por junuloj kaj komencantoj. Al la pli multaj tekstoj estas aldonita nur la unuvoĉa melodio (kantnotoj), sed ĝi ĝenerale sufiĉas por la kantado.

M.

La vojo. Himno esperantista. Poemo de D-ro Zamenhof. Muziko de René Deshays. Prezo 2 fr. frankoj, ĉe Librairie Centrale Espérantiste, 11 Rue de Sèvres, Paris 6.

La melodion de tiu himno komponis s-ro Deshays laŭ la deziro de la majstro mem, kaj unuafoje ĝin prezentis dum la Kongreso de Boulogne-sur-Mer la patrino de s-ro Bolingbroke Mudie. La nuna eldono estas la tria. Ĝenerale mankas al niaj kunvenoj taŭgaj kantoj originalaj; tial « La vojo » trovas nian varman rekomendon.

M.

Joost van den Vondel: Josef en Dotan. Biblia dramo. El nederlanda lingvo tradukita kaj eldonita pere de la katolika esp. klubo « Suda Kruco » en Eindhoven, Nederlando. Prezo 0.75 guld. 82 p. 15 x 20,5 cm. Ĉi tiun dramon oni prezentis dum la IKUE-Kongreso en Hago (aŭgusto 1937).

Harold F. Bing: La problemo pri Palestino. 14 p. 14 x 21,5 cm. Eldonita de Internacio de Militkontraŭuloj, 11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo. Interesa studo pri la palestina problemo, kaj pri la juda problemo entute. Bedaŭrinde la broŝuro enhavas multe da presaj kaj ankaŭ lingvaj eraroj.

4 polaj gvidfolioj ilustritaj en Esperanto prezentas al la gesamideanoj la plej vizitindajn urbojn de Pollando, nome: Varsovio (ĉefurbo), Krakovo (urbo de preĝejoj kaj de la fama reĝa kastejo Wawel), Gdynia (plej moderna havenurbo) kaj Vilno (iama ĉefurbo de Granda Litova Duklando). La folioj pri Varsovio enhavas unu paĝon kiu montras bildojn precipe karajn al esperantistoj (tombo de la majstro, strat-tabulo de strato D-ro Zamenhof, memortabuloj de domoj kie loĝis Zamenhof kaj Grabowski).

Jubileajn presaĵojn tre plaĉajn eldonis Aŭstria Esperantista Federacio, Holoĉerg. 55/9, Wien 15. (Prezoj ne aldonitaj). Ili estas: 1. poŝtkarto kun portreto de Zamenhof en nigra preso, kaj jubileaj vortoj en ora preso; 2. koverto kun verdkolora surpriso « Esperanto 1887-1937 »; 3. leterfolioj kun sama surpriso kiel 2.

Vizito al la Pariza Ekspozicio

Antaŭ mia forvojaĝo al Francujo mi jam ofte aŭdis kaj legis, ke la Pariza Ekspozicio ne estas finita, ke ĝi estas fiasko, ke ĝi ne estas vidinda, kaj tiel plu.

La celo de tiu ĉi necese ne tre longa artikolo estas montri, ke el tiuj asertoj la unua estas nur parte vera (kaj nun eble estas tute malvera) kaj la aliaj du estas absolute absurdaj.

Alveninte vespere en Parizo, mi la postan tagon faris mian unuan viziton al la Ekspozicio, pere de la ĉefa enirejo, kiu estas ĉe la novkunstruita « Trocadero », kontraŭ la enigma Monumento de la Paco. De nun, mi timas, mia priskribo konsistos plejparte el superadjektivoj, el kiuj la unua estas: neforgesebla. Jes, neforgesebla estas mia unua ekvido de la Ekspozicio. Starante ĉe la Trocadero, belega konstruaĵo ŝajne nefinita interne, mi rigardis super longega fontan-baseno la larĝan avenuon kiu kondukas al la ĉiam grandioza Turo Eiffel. Ambaŭflanke de la avenuo staras la plej multaj alilandaj pavilonoj — entute estas 42 tiaj, do estas neeble menciigi ĉiun, cetere mi ne havis la tempon por esplori eĉ la duonon, malgraŭ kvin longaj vizitoj!

Mi precipe memoras la bele faritan lignan pavilonon de Jugoslavujo, la ĉarmajn konstruaĵojn de Nederlando, Aŭstrujo kaj la Hispana Respubliko kaj precipe de Japanujo. El la multaj tieaj alilandaj pavilonoj do certe elstaras; temas pri tiuj de Germanujo kaj Sovet-Rusujo. La germana ja estas simpla kaj altega, ĝi impresas ĝuste pro tio, sed multe pli impona sendube estas la rusa, kiu konsistas el longa konstruaĵo kun alta antaŭturo, sur kiu staras du figuroj, viro kaj virino. Neniam mi forgesos la aspekton de tiuj grandiozaj figuroj — tute el arĝento — sub la brilega sunlumo. Mi rimarkis, ke ĉiam estas granda amaso ĉirkaŭ la enireja ŝtuparo de la germana pavilono, ŝajne pro tio, ke de tie oni plej bone povas admiri la rusan.

Interne ĉiuj alilandaj pavilonoj estas interesaj. La germana kaj rusa, kiel ankaŭ la itala, arde propagandegas. Ĉiu el la tri, precipe la itala, estas bele kaj interese aranĝita interne, kaj klopodas elmontri la progreson de la koncerna lando. En la rusa plej interesis min la kolekto de ruslingvaj lernolibroj por infanoj kaj la du uson-aspektaj luksaj aŭtomobiloj fabrikitaj en la lando, sed en rapida ĉirkaŭvago oni ja ne povas studi ĉion — des pli bedaŭrinde.

Transirante la riveron per la Pont d'Iéna oni vidas maldekstre la grandan kaj beletan konstruaĵon de Belgujo (unu el la plej plaĉaj) kaj dekstre la modernan kaj simplan pavilonon de Grand-

Britujo. Kiel anglo mi kompreneble eniris iom fiere tiun lastan — sed mi konfesas, ke mi eliris pli modeste. Dignoplenaj eble estas kaj la konstruaĵo mem, kaj la interna aranĝo — sed nur tio. Mi memoras tri elstarajn punktojn: grandega bildo de nia ĉefministro fiskaptanta, ampleksa kolekto de diversaj porcelanaĵoj, kaj antikva modelo de ĉevalrajdanto kaj ties specialaj vestaĵoj, kun klarigo kiu absurde supozigas, ke en Britujo oni vidas pli da ĉevaloj ol bicikloj! Proksime estas la pavilonoj de Italujo, Svisujo, Svedujo, Ĉeĥoslovakujo — kun bela ekspozicio de ties konata vitro-arto, kaj Usono. La lasta bedaŭrinde ne estis tute finita interne, kaj mi povis nur admiri la imponan malbelecon de la ekstero.

Nun mi devos transalti al la aliaj partoj de tiu ĉi plej grandioza ekspozicio, kiun certe la mondo iam vidis. En neniu alia ĉefurbo krom Parizo estus eble starigi tian entreprenon, kies grandeco estas apenaŭ imagebla. Pensu nur, ke ĝi kovras ambaŭ flankojn de la Seine por pli ol tri kilometroj (kaj en tri lokoj flankeniras), ke pro lerta aranĝo de multaj specialaj pontoj oni senĝene vagas ĉien en la 80-hektara ekspoziciejo sen tuŝi la diversajn publikajn stratojn kiuj devas transiri ĝin. (La longaj pavilonoj de Germanujo kaj Rusujo efektive estas konstruistaj super iu riverborda bulvarado!)


La multaj diverskoloraj konstruaĵoj, kiuj reprezentas la francajn koloniojn, staras sur longa mallarĝa insulo meze de la Seine, sed mi ne trovis ilin tiel interesaj, kiel la aliajn partojn de la Ekspozicio. Mi apenaŭ rajtas diri tion, ĉar mi ne bone esploris tiun kvartalon. Iomete ekster la tereno de la Ekspozicio troviĝas la nova Muzeo de Moderna Arto, en kiun oni metos la kolekton el la

« Luxembourg ». Ĝi estas tre ampleksa tute moderna konstruaĵo, sed ŝajnis al mi, ke estas tro da statuoj ĉirkaŭ la antaŭkorto. Proksime, en parto de la « Grand Palais » estas la Palaco de Eltrovoj. Jen miriga elmontrado de populara scienco. Kiom mi envias la Parizanojn, ke ili havas tian ravan muzeon. Mi esperas, ke ĝi restos post la fino de la Ekspozicio, kiel kelkaj aliaj konstruaĵoj (la ĵusmenciita Artmuzeo, la Trocadero ktp.).

La « Parc des Attractions » (amuzejo) estas la plej ampleksa kaj plej bone ekipita, kiu iam ekzistis ekster Usono. Por tiuj, kiuj ŝatas svingiĝi 60 metrojn super la tero, kiuj ŝatas ĉiajn plej terurajn sensaciojn — jen vera paradizo kie oni povas pasigi multajn horojn — kaj elspezi multe da mono.

El la ceteraj pavilonoj, menciindaj estas tiuj de la Aeronautiko, de la Radio, de la ŝuĝieno, de la Jaĥtado, de la Akvotransporto, de la Publikeco, de la... sed ĝi nur fariĝos longa listo, estas tiom da mirigaĵoj en tiu ĉi unika Ekspozicio! Tio estas, efektive, sia sola plendo. Ĝi estas tro granda; oni heroe klopodas vidi ĉion, kaj preskaŭ freneziga. Eĉ dumtage estas tro da vindendaĵoj, tro da grandiozeco — sed nokte! Ho ve, mia kompatinda menso devis ensorbi tiom da ravaj lumigaĵoj, tiom da mirige belaj piroteknikaĵoj, ke ĝi foje konfuziĝis. Sur la Seine (jes, sur) estas centoj da fontanoj kiuj ŝprucigas la akvon kaj vertikale, kaj horizontale. Nokte oni lumigas ilin per ĉiam ŝanĝiĝantaj koloroj. La beleco de tiu spektaklo estas preskaŭ blindiga, ĝi gravuris impreson sur mia memoro, kiu restos tie la tutan vivon. Kaj en ĉiu parto de la Ekspozicio troviĝas similaj fontanoj, precipe antaŭ la Trocadero. Ĉiuokte dekmiloj da homoj sidas kaj rigardas ilin — kaj pensas, mi esperas, kiel mi, ke la aranĝintoj de tiu ĉi grandioza entrepreno estas geniuloj, pri kiuj Francujo nepre devus fieri.

E. W. Amos.



PARIZO: Katedralo de S-ta Magdaleno.

D-ro A. Sommer-Batek :

Projekto kiel ordigi la mondon per kulturaj fortoj (*)

(Daŭrigo.)

Estas pli malfacile unuigi tiajn homojn ol la proletariojn, ĉar tiuj homoj havas sian propran mondpercepton, kiun ili akiris per sia propra forto kaj pro tio estas malfacile ilin konvinki. Ĉiu el ili havas sian limigitan programon kaj ne volas submetiĝi al kompromisoj. Tial ankaŭ la grandaj scienculoj estas netuŝeblaj kaj disputemaj. Estas malfeliĉo, ke tiuj homoj ofte estas edukataj al ĉio, nur ne al bona konduto ĝentila. Kaj tamen oni devos konvinki ankaŭ ilin, ke en ilia propra intereso kaj en intereso de ilia scienco estas necese, fondi potencon mondan kulturalan korporacion, kiu estus kapabla defendi la rajtojn de libera esplorado de sciencisto kaj tiu estus kapabla konstati kaj klarigi, kio estas la scienco kaj kio ne apartenas al ĝi, kio servas al la homaro kaj kio estas la balasto de la vivo, kio estas justeco kaj kio maljusteco, kio kreas kulturon kaj kio malhelpas ĝin.

La kultura mondparlamento.

Estas necese interkompreniĝi. Ni bezonas la kulturalan demokration, sur kies bazo oni povus krei la politikan demokration. Tio, kio nin ĉiujn ligas, estas la zorgo pri la kulturo, la vera kulturo de la moderna eŭropano, de la moderna homo. Mi poralas pri eŭropano — ĉar ni volas komenci en Eŭropo. En ĉiuj eŭropaj ŝtatoj ekzistas sciencaj kaj artistaj akademioj kaj aliaj kulturaj korporacioj, kiuj estas la portantoj de kulturaj ideoj. Multaj el ili interrilatas eĉ kun eksterlandanoj pri siaj specialaj problemoj. Kaj tamen ĉiuj scienculoj devus pripensi ĉefe la du problemojn :

1. Kion fari, por konservi nian kulturon al la venontaj generacioj ?

2. Kion fari, por ke per la kresko de nia kulturo estu ankaŭ plibonigata nia vivo ?

Tiuj du problemoj estas kunligitaj, ĉar ne valorus konservi kulturon, kiu ne plibonigas nian vivon. Se la scienco subtenas la militojn, oni ne devas miri, se ĝi pereis per ili. Se la registaro subpremas la popolojn, oni ne povas miri, se ekestos revolucio, kiu forigos ĝin. Prezidanto Masaryk diris okaze de sia foriro, ke la ŝtatojn konservas tiuj fortoj per kiuj ili estis kreitaj. Kaj same oni povas aserti, ke la ŝtatoj pereas pro la

fortoj, kiujn ili ne povis kunligi kaj alkonformigi al sia evoluo.

Se nia kulturo devas daŭri, ĝi devas organizi ĉiujn fortojn, kiuj kreas la mondhistorion. Unu el la plej gravaj fortoj estas la presita vorto, ĉar ĝi influas ĉiujn, kiuj scias legi. La gazetaro estas potenco, kaj tial oni devos toleri nur tian literaturon, kiu ne subfosas la moralon kaj honestecon. Memkompreneble la simpla malpermeso nenion utilus. Estas fakto, ke la malpermesitaj fruktoj plej bongustas. Estas necese, tion fari per fortoj demokratiaj, ĉefe per edukado. Ĉiu havas tian gazetaron kaj literaturon, kiun li postulas kaj meritas. La morala popolo certe preferos moralan literaturon, kaj la nemorala de si mem devos malaperi. Sed tamen eĉ la plej grandaj ideoj presitaj dependas de la materialo, sur kiu ili estis presitaj. La babilona kaj egipta kulturoj restis konservitaj ĝis nuntempo nur tial, ĉar ĉiu reĝo tuj, post kiam li suriris tronon, komencis fondi subteran muzeon, kie li kolektis memorajojn pri sia regado en bildoj, surskriboj, modeloj, kaj la riĉecon, kiun li akiris dum militoj. Fine oni ankoraŭ aldonis al ĉio lian konservitan, balzamumitan kadavron, ofte eĉ lian tutan sekvantaron. Ĉio tio stis bone konservita en murkonstruitaj ejoj, kien enpenetris nek la sunradioj, nek akvo. Tial post multaj jarmiloj ni eksciis pri la kulturo de tiuj popoloj pli multe, ol ni scias pri la kulturo de niaj propraj antaŭuloj de kelkaj jarcentoj.

Kiel konservi nian kulturon ?

Por ke ni povu konservi nian kulturon al niaj posteuloj, estas en unua vico necese, ordigi ĝin. Pro granda komplikeco de la kulturo estas necese, uzi al ĝia ordigado la matematikan eltrovon, t.e. la nombron. En la Monda Palaco en Bruselo estas la mondliteraturo ordigita laŭ la decimala sistemo. La nombro plej bone taŭgas por ĉiuspeca ordigado. Tial oni numeras la dokumentojn en arkivoj, librojn en librejoj, seĝojn en teatroj kaj similaj ejoj, elementojn en kemio, stelojn en la astronomio, jarojn en la historio, tagojn de la monato, horojn de la tago ktp. ktp. Tiel oni povas ankaŭ numeri la ideojn, kiel mi priskribis en mia ĉefa verketo : « Kiel ni ordigu nian bibliotekon » Sed estus necese fondi instituton ideografikan, kiu konsistus el fakuloj de ĉiuj sciencoj, artoj kaj aliaj kulturaj sferoj.

Kion fari per numeritaj ideoj ?

Por ke tiuj numeritaj ideoj kaj scioj estu konservitaj al estontaj tempoj, estus necese, ĉiujn mallonge priskribi. Tiun laboron devus plenumi la plej taŭgaj personoj, kiuj devus ĝin ankaŭ daŭrigi. Tutajn armeojn de inteligentuloj oni povus okupi pri tio. Al ĉiu nombro estus aldonita flugfolio, kiu klarigus la kernan ideon mallonge kaj kiu klasifikus la ideojn subordigitajn. Tiujn flugfoliojn oni povus malmultekoste disvendadi al ĉiu, kiu havus intereson por tio. Oni povus ankaŭ aldoni la nomaron (indekson) de la plej grava mondliteraturo. Per tio la esploristoj ŝparus multe da tempo, ĉar ili ofte serĉas tion, kion jam aliaj multfoje estis devigataj serĉi.

Per kiu skribo oni faru la registrojn ?

La respondo estas unusola : *per skribo scienca*. Apartaj sciencaj fakoj uzas jam la sciencan skribon. La kemio havas siajn formulojn, la matematiko siajn ekvaciojn, la geografio siajn signojn, la muziko siajn notojn ktp. Leibniz postulis jam en la deksepa jarcento, ke estu kreata universala skribo per signoj, kiun li nomis « *spécieuse générale* » aŭ en latina lingvo « *characteristica magna universalis* ». Multaj pazigrafoj kaj ideografoj provis elpensi tian skribon, sed ili ne sukcesis ĝis hodiaŭ. Provo solvi tiun problemon estas miaj Neoglifoj, kiujn mi eldonas en kelkaj lingvoj. Mi ne volas aserti, ke miaj Neoglifoj estas la sola ebla solvo de ideografio, sed mi argumentas per ili, ke tiu solvo estas ebla kaj relative facila. Ĉiu infano povas lerni miajn Neoglifojn. Mi elektis signojn jam en la sciencoj konatajn, kaj mi ligis ilin per la tre simpla gramatiko, en kiu nenio estas superflua. Ĉar per miaj Neoglifoj oni povas esprimi ne nur la ideojn al ni konatajn, sed ankaŭ tiajn, kiujn ne havas unuopaj lingvoj, kaj tiajn, kiujn oni ankoraŭ ne eltrovis. Pro tio, ili tre bone taŭgas por la registro de la scienco por la estonteco. Se en tiu registrado oni aldonos tradukon esperantlingvan aŭ nacilingvan, ĉiuj niaj scioj povos esti konservataj, sed ankaŭ sen iaj tradukoj estos facile, ĉion diveni, sen iu ajn ŝlosilo.

*) Represo, tradukado, disvastigo petata !

De niaj korespondantoj

Ĉeĥoslovakio:

Flugmotoro kun oleoŝaltilo.

Ĉeĥoslovaka inĝeniero en Praha faris eltrovon, kiu eble inaŭguros novan epokon de la aviado. Per relative malmultekosta kaj simpla aparato, kiu estas adaptebla ankaŭ al ordinara flugmotoro, oni povas ŝanĝi la oleon, kiun oni uzas kiel fortofonton por la motoro. Kiam oni startis per benzino, oni povas post la ekflugo anstataŭigi la benzinon per « kruda » oleo, tiel grave malaltigante la koston por la flugado. Ne temas pri nova motoro de Diesel-tipo, sed pri ia antaŭgasigilo, kiu disrompas la oleon kaj apartigas por la motoro la utilajn gasojn. La tuta aparato pezas nur 2-3 kilogramojn kaj kun bona rezulto ĝi estas provita interalie sur la konata Walter-Micron-motoro.

Adi.

Altaj enspezoj.

Preskaŭ nenie en la mondo, individuoj atingas tiel altajn enspezojn kiel en Usono. Aliflanke oni ne devas ĝeneraligi, ĉar ankaŭ en Usono ekzistas, apud la malgranda taĉmento da Krezoj, grandega armeo da malriĉuloj kaj mizeruloj. Jen la jaraj enspezoj de kelkaj el la direktoroj de grandaj industriaj entreprenoj, jaro:

Darryl Zanuck, vicprezidanto kaj produkcia direktanto de 20th Century Fox Pictures (filmkompanio) enspezas 260000 dolarojn. Alfred Sloan, prezidanto de General Motors, gajnas jare 255000 dolarojn. F. S. Wheeler, prezidanto de la American Canning Company, 86000 dol. Camille Dreyfus, prez. de Celanese Corporation, 107000 dol. L. Du Pont, prez. de konata municiofabriko, 100000 dol. S.S. Kresge, prez. de grandmagazena kompanio, 107000 dol. David Sarnoff, prez. de Amerika Radio-Korporacio, 75000 dol. H. C.

Walter Poppeck:

Tumulto en la poŝtmarka kesto

Preĝeja turhorloĝo en malgranda urbeto anoncas la deknunajn horon. En subtegmenta ĉambreto sidas Kurt. Antaŭ li sur la tablo kuŝas dika libreto, la poŝtmarko-albumo. Poŝtmarkoj estas la amikoj de Kurt, amikoj el ĉiuj landoj de l' tero, kiuj tiom multe scias rakonti, kiuj instruas pri fremdaj landoj kaj pejzaĝoj, fremdaj homoj kaj bestoj.

Sur la tablo kuŝas ankoraŭ multaj poŝtmarkoj, kiuj atendas, ĝis Kurt ilin gluos en la albumon. Sed hodiaŭ jam estas tro malfrue. Kurt klapfermas la albumon kaj metas ĝin en la bretaron al la aliaj libroj. Tiam li kolektas la poŝtmarkojn en cigarkeston kaj metas tiun sur la albumon. Kurt estas tre laca kaj tuj enlitiĝas.

Sed apenaŭ la lumo estas estingita, tiam komenciĝas tumulto en la kesto kun la poŝtmarkoj.

« Ve, vi gratis min per viaj akraj pintoj », plendis la poŝtmarketo en helverda robo el Viktoria-lando kaj kolere alrigardis la maljunan poŝttrajdiston sur la sveda jubilea marko.

« Trankviliĝu, fraŭlino », enmiksitis sin la usona Lindbergh-marko, « tiu grizharulo en sia tuta vivo ne multe vojaĝis, kie li do estus lerninta, bone konduiti! »

Tiuj vortoj kolerigis la poŝttrajdiston. Tio estis ofendo! « Silento, vi fanfaronulo! » li kriis per tonda voĉo, tiel, ke la fermilo de la kesto klaketis, « la afero tute ne koncernas vin. Ne

Nederlando:

Iama preĝejo — nuna vendejo.

En la bela regiono « Gooi », parto de Nederlando, troviĝas provinca urbeto Bussum. Antaŭe ĝi estis nur kampara vilaĝo, sed la beleco de la ĉirkaŭaĵo logis turistojn, kaj tiel la vilaĝo kreskis ĝis urbo. En la tempo, kiam Bussum estis vilaĝo, ĝi havis etan preĝejon, kiu sufiĉis tiutempe; sed poste oni bezonis grandan, modernan — sekve oni konstruis tian, kaj la malnova fariĝis superflua. Kion fari? Ĉu malkonstrui aŭ vendi? Longtempe oni hezitis kaj uzis ĝin por diversaj celoj, ĝis la nuna firma aĉetis ĝin antaŭ proksimume dudek jaroj. Estas tute stranga aspekto. Ekstere ĝi estas preĝejo kaj portas la nomon « Irene », tuj super la ĉefa enirejo (entute estas ses enirejoj) troviĝas la vortoj « Timu la Eternulon », sed sur la pordo pendas anoncetaŭleto kun la vortoj « Eniro libera, aĉetado nedeviga », aŭ io simila. Kiam oni eniras, tuj la teksto « Timu Dion kaj tenu Liajn ordonojn, ĉar ĉi tio decas al ĉiuj homoj » kaptas la okulon, sed — sub la teksto sur stabloj kuŝas diverskolora amaso da tapiŝetoj, merceraĵoj, subvestoj kaj samspecaj artikloj. Ĝi estas vera unikajo en Nederlando, kaj eksterlandanoj regule vizitas ĝin.

Bep Bresler.

Norveĝujo:

Bona utiligo de uzitaj poŝtmarkoj.

La fakton, ke ankaŭ uzitaj poŝtmarkoj havas valoron, eluzas s-ro poŝtestro Frantzen en Nesbyen, Norveĝujo. Li kolektas poŝtmarkojn en la tuta lando, ordigas kaj revendas ilin, kaj uzas la monon por resaniga kuracado de tuberkulozaj infanoj. Multaj homoj sendas al li poŝtmarkojn, tiel ke li konstante bezonas kvin homojn por purigi kaj ordigi la markojn. Multaj miloj da kronoj ĉiujare helpas al malsanaj infanoj regajni sanon kaj feliĉon.

-aj-

kredu, ke vi havas la rajton enmiksi vin, pro tio ke vi jam veturis en aviadilo! »

La Lindbergh-marko silentis. Ĝi ne plu riskis diri ion, ĉar ĝi kun la maldelikata poŝttrajdisto ne volis havi konflikton.

Ĝus estis finita ĉi tie la disputo, kiam en alia angulo komenciĝis nova tumulto.

Kolumbo, la eltrovinto de Ameriko, per sia senlensa teleskopo puŝis al la nazo de Gabun-negro. Tiu faris paŝon malantaŭen kaj fendis per sia lanco la kapveston de la persa ŝaho Muzaffer-Edin. Kriante la ŝaho saltis al la tute senkulpa Gabun-negro, sed dank' al la komprenema interveno de l' egipta reĝo Fuad ne okazis interbatado.

Nun komenciĝis laŭta kriado en alia angulo. Sed ĉi-foje la tumulto estis bonhumora. La dika birdo Kokaburra el Aŭstralio kredis la surpreron sur turka poŝtmarko serpento kaj kun malfermita beko atakis ĝin. Sed, alproksimiĝinte, ĝi rimarkis la eraron kaj laŭte ekridis. Ankaŭ ĉiuj aliaj devis kunridi, kaj eĉ la urugvaja generalo Fructuoso Rivera sur la 5-cenda poŝtmarko, kiu estas konata el la batalo de Rincón, ne povis deteni sin kaj aŭdigis laŭtan ridegon.

« Pst! » admonis Frederiko la Granda de Prusujo, « ne tro laŭte, por ke ni ne ĝenu iun! Cetere, estas nun tempo por ripozi. » —

La turhorloĝo obtuze anoncis la deknunajn horon. La sveda poŝttrajdisto ankoraŭfoje blovis en la kornon, kaj tiam regis nokta silento. —

Kurt dormis jam tutan horon kaj nenion aŭdis de la bruoj en la kesto. Ensonĝe li troviĝis en landoj malproksimaj, li vidis palmojn kaj piramidojn, fremdajn pejzaĝojn kaj bestojn, pri kiuj la poŝtmarkoj tiom rakontis al li.

Carl Elof Svenning:

Kakto kapablas flori.

Kial estas enpremita nia koro inter spiregantaj ripoj? Kial ne povas ni porti ĝin kvazaŭ varmetan panon sur niaj fingroj por elŭti pecetojn al ĉiu birdo? —

Ho, vi, kiu gardas la sablajn dezertovojetojn, ho, vi, kun kakte sekaj korpoj, kiuj ĵetas tra la spaco vian akuzon post varmetaj ventoj, post malsataj voluptoj: sur la najlornamita kiraso de via brusto ekfloros al vi el la koro lilio. Kaj nur unufoje en la jarcento borĝos kalvaj vastegoj, kaj ekrios la homoj.

Mieczyslaw Braun:

En iu tago

Mi kuŝis sur la tabullito kaj ŝajnis, ke mi dormas, sed mi ne lasis lin el la okuloj eĉ por momento, rigardante lin trans la duonfemitaĵ palpebroj. Estis io maltrankviliga en lia sinteno, kion mi neniam ĝis nun rimarkis; li levigadis for de la tablo kaj promenadis de angulo al angulo; subite li senmoviĝadis ĉe la fenestro, alprenadis la frunton al la vitro kaj denove sin turnadis al la tablo kaj tie sidiĝis, enpenŝiĝinte.

Mi vidis precize — lia vizaĝo estis pala, liaj manoj tremis. Li skribis rapide kaj ofte ĉesadis por reveni al la fenestro. Ekstere de la fenestro pluvis, jam de kelkaj tagoj forestis la suno. Li denove sidis ĉe la tablo. Lia hartufo estis taŭzita, la haroj faligis sur la frunton, malsekan de ŝvito. Dum li apogis kapon kaj longe rigardis en la malhelan angulon de la ĉambro, en kiu la disŝirita tapeto pendis nudigante flavan muron, mi ekvidis ke liaj okuloj estas plenaj de larmoj.

Mi ne scias, ĉu li ŝajnis, ke li ne rimarkas min, aŭ ĉu li forgesis tute mian ekziston, — mi neniam vidis lin dum tiel stranga stato. Ek-kaptis min malkomprenbla timo, mi eksentis malvarman tremon en mia korpo; mi kuŝis senmove, mi timis laŭte spiri. Kion ĉio-ĉi signifis? Mi divenis, ke ion teruran, al mi nekonatan; mi sentis la teruron; al mi ŝajnis, ke mi enspiras la odoron de disfosita freŝa tero. Mi silentis.

Li prenis el la tirkesto nigran ŝtalan objekton, iam mi ĝin vidis.

Li trankviliĝis tuj. Li staris senmove antaŭ la spegulo kaj turnis la pafiltubon al la tempio. Mi rigidiĝis, rigardante lian vizaĝon — li milde kaj kviete ridetis; sole la larĝigitaj pupiloj transbriligis la internan lumon.

Liaj lipoj moviĝis sensone, sed mi povis legi la vortojn, kiujn li ne elparolis.

— Jen ĉio, — li flustris, — jen ĉio — la vivo fariĝis pli malbona ol vivo de hundo, — nenio jam plu okazos. —

Mi komprenis, ke ekestos tuj ia terurega krimo, se mi ĝin ne malhelpos. Subite mi ekleviĝis de la tabullito, kaj ĝemante mi eksaltis al li; mi ekkaptis per miaj dentoj lian mal-supren pendantan manon, mi ĉirkaŭprenis liajn genuojn; mi ne povis eligi la voĉon el mia gorĝo. Li ektemis. Li forĵetis la revolveron kaj sin turnis al mi.

— Ho, vi karulo...

Li ĉirkaŭprenis mian kapon kaj longe rigardis miajn okulojn. De liaj okuloj elfluis larmoj.

— Ho, vi, — li diris, — mia kara hundo...

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organo de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Naskiĝo. En **Casablanca** (Maroko), la 24.7.1937, naskiĝis al gesinjoroj Fink fileto, kiu ricevis la nomon Pierre-André.

Naskiĝo. Udo havas nun fratineton Bärbel, kiu naskiĝis la 20. Tion sciigas la estontaj kaj estontaj geamatoj en la tuta mondo geanoj Wilhelm kaj Käthe Hoffmann, **Pr. Börnecke, Bez. Magdeburg, Ob. Kirchstr. 17, Germanio.** — Nian koran gratulon!

Naskiĝo. Sub la signo de la verda standardo naskiĝis bela, dika fileto ĉe ges-roj J. Robert Lostrie-Lamy en **Woluwe-St. Lambert, Belgio, 65 rue du Pont Levis, kiu ricevis la nomon Claude.** La patrino kaj la bubo tute bone fartas; la patro tre ĝojas pro la alveno de estonta esperantisto. Antaŭan dankon pro ĉiuj gratuloj, al kiuj certe estos responde! — Ankaŭ nia redakcio tutkore gratulas.

Geedziĝis en Glasgow, Skotlando: S-ro John Reid kaj Alinjo, filino de R. Stevenson, del. de IEL en Stevenston, la 15-an de julio; ambaŭ estontaj membroj de la Glasgova grupo. — Korajn bondezirojn!

Geedziĝo. La 8.6.1937 geedziĝis gesamideanoj D-ro Jaime Scolnik, IEL-Vicdelegito en Córdoba, Argentino, kaj Alicia Guastavino Centurión, IEL-membro el Mercedes, Urugvajo. Reveninte el Mercedes la nova esperantista paro haltis en Buenos Aires, kie la loka gesamideanaro festis ilin ĉe la sidejo de Argentina Esperanto-Asocio. Nova ligilo por la argentina kaj urugvaj gesamideanaro kaj ni prezentas al la geedzoj nian plej koran gratulon.

Geedziĝis la 18.8. s-ro Pieter Jan Wilhelmus Schilperoord kaj Johanna Wilhelmina van Spronsen, loĝantaj Kreekweg 51a, **IJsselmonde ĉe Rotterdam, Nederlando.** — Ni kore gratulas niajn gesamideanojn!

Interesaj aranĝoj de la Nova Grupo, la 18-an de septembro. Skribu multnombre! Responde garantiata. « Nova Tagiĝo », Huis Coutereel, Bondgenootenlaan 71, **Leuven, Belgio.**

Ekspozicion aranĝas Manchester kaj Distrikta Esperanto-Unuiĝo, sekr. L. Hesling Addie, 23 Deyne Avenue, Rusholme, **Manchester 14, Anglujo.** Oni bonvolu sendi multajn ekzemplerojn de murafiŝoj, broŝuroj, reklamajoj, ĵurnaloj ktp. Montru al la aŭtoritatoj kaj civitanoj de Manchester, ke nia lingvo estas multe kaj diverse uzata en ĉiuj landoj! Ni certe respondas pri ĉiuj sendaĵoj. Aliaj Esperanto-gazetoj bonvolu repressi!

Informojn pri re-enkarniĝo, karmo-leĝo, antaŭnaska kaj postmorta vivo, okulta konstitucio de l' homo kaj universo deziras Emil Mai, Mühlfeldgasse 11, **Gablonz a. N., Ĉeĥoslovakio.** (384)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgio.

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1, Anglujo.** (432)

Lernanto 24-jara deziras korespondi kaj interŝangi ilustritajn ĵurnalojn kaj poŝtkartojn kun lernant(in)oj tutmonde. Nepre respondos. Leslie Cory, 5, Churchmore Road, Streatham, **London, Anglujo.**

Latvio, Riga, F-ino Alma Mikelsons, Pasta kaste 904, deziras korespondi kun ĉiulandanoj, interŝangi librojn kaj ilustritajn periodaĵojn. — Ankaŭ deziras korespondi s-ro Eduardo Mikelsons (sama adreso).

Ĵen Litovujo! Aperis serio de kvar belaj poŝtaj vidaĵkartoj pri Litovujo kun Esperanto-teksto. Kontraŭ unu respond-kuponon petu ilin de la ĉefdelegito de IEL, s-ro L. Atseika, **Ukmergė, Litovujo.**

Svedo 24-jara deziras korespondi per eksterlanda viro aŭ virino. Gösta Olsson, Pappersbruket, **Tumba, Svedujo.**

Juna svedo deziras korespondi kun gesamideanoj tutmonde per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj. Adreso: Arne Eriksson, Engelbrektsgratan 19a, **Örebro, Svedujo.**

Filatelistejo! S-ro Sven Åhborn, Tungatan 2, Skövde, Svedujo, deziras interŝangi poŝtmarkojn skandinaviajn kontraŭ alilandaj kun filatelistejoj tutmondaj. Certe respondas!

Van Wuytswinkel Fr., Patersstraat 240, Turnhout, Belgio, 22-jara oficisto, fraŭlo, deziras korespondi kun ĉiulandanoj pri ĉiuj temoj, precipe per poŝtkartoj ilustritaj.

Samideanoj en Berlin, Dresden, München kaj Köln! Meze de septembro mi travojaĝos viajn urbojn; mi estos tre dankema, se iu el vi bonvolos renkonti min. Por ke mi povu komuniki la precizan daton, mi petas sendi al mi vian adreson. Doktoriganto en ĵuro Henryk Gielb, Poŝtkesto 607, **Warszawa 1, Pollando.**

Tutmondan korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj deziras 30-jara ĉeĥoslovakio. Responde garantiata. Skribu al s-ro A. Košťál, **Trnovany, Teplice-Š., Tr. Dr. Beneše, Ĉeĥoslovakio.**

M. Czilczler, Szegvar, Hungarujo (IEL-del.) interŝangas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. **20 Elbeuf'aj reklammarkoj** estas riceveblaj kontraŭ alsendo de 2.50 fr. fk. aŭ 2 resp.-kuponoj, de s-ro G. Saget, 4 Rue St. Jacques, **Elbeuf (S.-I.), Francujo.**

S-ro V. Šavel, Strašnice, Rybníčky, Praha, Ĉeĥoslovakio, donas artikolojn uzublajn por naci-lingvaj revuoj, petas artikolojn pri radio, televido por ĉeĥoslovaka naci-lingva revuo. Okaze de publikigo de via sciigo vi ricevos pruv-ekzempleron. (438)

50 ĉeĥajn kronojn kiel rekompencan ricevos la samideano, kiu resendos al mi la binditan « pirato »-kolekton (malhelverda libro), kiun mi perdis dum la Jubilea Kongreso en Varsovio. Hupo Popper, **Böhmisch-Kamnitz, Ĉeĥoslovakio.**

Ekspozicia materialo. Nia societo aranĝas meze de septembro publikan propagandan ekspozicion kaj petas grupojn aŭ unuopajn samideanojn je alsendo de efika materialo. Adreso: Otto Sternschuss, **Reichenberg, Ĉeĥoslovakio.**

Geesperantistoj, sendu vian fotografaĵon kaj adreson, vi ricevos komencon de esperantista albumo kun multaj fotografaĵoj kaj adresoj senpage. Bonvolu sendi al: A. Indrulis, Fotatelja, **Laizuva, Litovujo.**

Publika Librarejo, Meadville, Pa., Usono, deziras ricevi **nacikostumpujon,** altajn je 25 centimetroj. Sendu antaŭkarton informan! Conrad Fisher, **Meadville, Pa., Usono.**

Orienta Kulturo kvaronjare aperas kun riĉa enhavo ilustrita. Orientaj problemoj freŝe traktataj. Jarabono: 8 resp.-kuponoj internaciaj. Specimeno kostas unu resp.-kuponon. Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, **Tokio, Japanujo.**

Varsjo, Pollando, str. Chmielna 67, s-ro Stefan Szmidt, deziras korespondi kun tutmondaj esperantistoj kaj interŝangi poŝtkartojn ktp.

Andrej Sidorov, Sredne-Smolenskaja ul. 28, Voronej, U.S.S.R., petas amikojn de Sovet-Unio jam nun sendi al li salutleterojn okaze de 20-jara datreveno de oktobra revolucio, por ruslingvaj ĵurnaloj; eĉ anonimaj leteroj estas dezirindaj.

20-jara knabo deziras korespondi kun gejunuloj pri diversaj temoj. Skribu al: S-ro Harry Törnskog, Högalidsgatan 34, **Stockholm, Svedujo.**

Du svedaj gefratoj, en la aĝo de 18-21 jaroj, deziras eksterlandajn korespondantojn. Skribu al: f-ino Inga Svensson aŭ s-ro Lennart Svensson, Brl. 170, **Ronneby, Svedujo.**

Internacia Katolika Informejo. — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus,** sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, **Oss, Nederlando.** (310)

Rakontoj kaj artikoloj pri homoj, bestoj kaj aventuroj en Borneo kaj aliaj aziaj landoj, de R. F. Vaughan: « **El Verdavalo** » por 1936; 48 paĝoj kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Mendu senpere de R. F. Vaughan, Sandakan, British North Borneo. (370)

Trafa propagandilo estas jarkolekto de LITERATURA MONDO. Abonprezo por jaro 4.50 ned. guldenoj, ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, **Scheveningen, Nederlando.** — Specimeno kostas unu internacian respond-kuponon. (392)

Kursaj ĵurnaloj utentu! Ni nelpos al iu dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, **Budapest VIII, Mária-u. 34.** (407)

« **Frateco** ». En ĉiu nova numero tiu ĉi revuo alportas al vi altan idealon kaj vin instigas al nova racia laŭnatura vivo. Abonkotiĝo 1 sv. fk., 3 resp.-kuponoj, kaj ĉiu egalvaloro. Adreso: « **Frateco** », Gazeto por frateca vivo, **Sevlievo, Bulgarujo.** (435)

KORESPONDA CENTRO INTERNACIA AMSTERDAM

2e Helmersstraat 22 (Nederlando)

havigas ĉiuspecajn korespond-adresojn, ebligas korespondadon kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, en ĉiuj lingvoj, organizas ŝak-, briĝ- kaj damkonkursojn, havas specialan filatelan merkaton.

Petu detalajn informojn! (437)

